

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 647 (10)

Oktobro 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

esperanto

REVUO INTERNACIA

OKTOBRO 1959

5 2 a J A R O

N-RO 647 (10)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represafon al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Cefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńska 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO PREZENTAS :

Fragmento de la nova parto de la kongresurbo, 1959

Enhavo

Al plia Universaleco	161
Intensigi la Kampanjon	161
Centjara estus jam la koro	162
Fotoj de la U.K. en 1912	162
Orienta kaj Okcidenta	166
Kongresraporto (teatro)	167
Pliaj membroj de IPK	167
La genio de Zamenhof	168
Amikoj kun la tuta mondo	169
Postkongreso en Krakovo	171
La utileco de Esperanto	174
Informoj por la junularo	177

Rubrikoj :

Okaze de la Zamenhof-jaro	163
Internaciaj Konkursoj	171
Tra la Mondo	172
29-a Kongreso de Blindaj Esperantistoj	174
Belartaj Konkursoj	175
Esperantista Vivo & Nekrologo	177
Radio	178
Ŝaka Rubriko	179
Krucvortenigmo	179
Oficiala Informilo	120

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

AL PLIA UNIVERSALECO

Inter la multaj impresoj postrestintaj post la 44-a Universala kongreso de Esperanto, persiste sin trudas la ideo, ke ĝi estis eble la plej universala el ĉiuj ĝisnunaj, kaj sendube la plej vaste internacia dum la postmilitaj jaroj.

Neniam ĝis nun ni vidis tiel grandskalan reprezentigon de la orient-eŭropaj landoj (ekz. 280 partoprenantoj el Bulgarujo). Sed ne nur tio. Ĉiuj kvin kontinentoj estis reprezentitaj. Facile oni renkontiĝis kun argentinaj, brazilaj, portorikaj kaj meksikaj delegitoj. Estis kutima vidaĵo la nacia kostumo el Indonezio, samkiel la araba vira kaptuko. Ni aŭdis paroli sudafrikanon, aŭstralianon, vietnamianon, marokanon kaj ĉinon, kaj estis nature vidi japanan delegiton prezidi la laborojn de unu el la sekcioj de la kongreso.

El vidpunkto de universaleco ni do povas noti sukceson kompare kun antaŭaj jaroj. Tamen ni ankoraŭ estas tre malproksime de la momento, kiam ni povos ripozi sur la laŭroj de triumfo.

Post la dua mondmilito la mondo konsciĝas ĉiam pli kaj pli pri la graveco de ekstereŭropaj popoloj. Dum la lastaj jaroj pluraj el ili kreis siajn sendependajn naciajn ŝtatojn, kaj aliaj estas pretaj fari tion en la proksima estonto. Ĉiuj el ili, grandaj kaj malgrandaj, ekmarŝis al rapida evoluo materia, kultura kaj politika, kaj ĉiuj ricevas helpon de diversaj internaciaj organizaĵoj kaj de opaj grandaj landoj por plirapidigi la progreson. Ankaŭ ĉiam pli kaj pli estas aŭdataj kaj aprezataj la voĉoj de la malgrandaj kaj malproksimaj landoj en la internaciaj kunvenoj. Unuvorte, Eŭropo ĉesis esti la centro de la mondo.

La Esperanto-movado enhavas en siaj fundamentoj la ideon de universaleco, kaj ĝi bonvenigis aziajn kaj afrikajn prelegantojn longe antaŭ ol UNESKO entreprenis sian grandan projekton pri reciproka aprezado de orientaj kaj okcidentaj kulturaj valoroj. Kaj kiam tiu projekto aperis, la esperantistaro ne nur bonvenigis ĝin, sed senprokraste kaj entuziasme aliĝis al ĝi, tute nature, ĉar tiu projekto ja plene harmonias kun la principoj kaj celoj de la Esperanto-movado.

UEA konscias ke ĝi estos universala en la plena senco de la vorto nur kiam en ĉiu lando de la mondo ekzistos landa asocio, en ĉiuj urboj kaj urbetoj de la kvin kontinentoj bone funkcia loka societo, kaj la delegitara reto estos dense interplektita inter multaj miloj da urboj kaj vilaĝoj.

La malproksimeco de tiu ĉi celo estu por ni plia stimulo por novaj fortostreĉoj kaj oferoj por ĝia atingo.

Jam antaŭ kelkaj jaroj UEA eklaboris por disvastigi Esperanton en landoj, kie ĝi tute aŭ preskaŭ tute forestas. Tiucele fondiĝis APO — agado en proksima oriento — kies membroj dum la lastaj tri jaroj agadis en Grekujo, Turkujo, Nepalo, Hindujo kaj aliaj aziaj landoj, kaj en Hindujo ankoraŭ laboras.

Ĉijare APO malfermos al si novan laborkampon, tiun de Afriko. La unua paŝo estos Maroko. Kaj poste sekvos aliaj grandaj virgaj landoj.

La prilaborinda grundo estas tiom vasta, ke la disponeblaj du-tri volontuloj estas nur gutoj en la maro. Dekoj, por ne diri centoj da propagandistoj, instruistoj kaj organizantoj estus necesaj por la rapida progreso de Esperanto en Azio, Afriko kaj Ameriko. Mankas unuavice kapablaj kaj disponeblaj laborantoj. Tamen ili estus verŝajne troveblaj aŭ prepareblaj iom post iom, se ni povus financi ilian vojaĝon kaj vivtenadon dum la laborperiodo.

APO ne estas intereso de kelkaj personoj, sed de la tuta movado. Ĝi bezonas aktivajn volontulojn. Sed ne nur vojaĝemajn personojn, sed

Intensigi la Kampanjon

La Zamenhof-Jaro estas planita kiel aro da sinsekvaj diversspecaj aranĝoj dum la tuta 1959 kun du kulminaj punktoj: Varsovio en Aŭgusto kaj la 15-a de Decembro. La celo, plurfoje akcentita, estas ne nur omaĝi al la aŭtoro de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ doni fortan antaŭenpuŝon al la afero de komuna, supernacia lingvo ĉie en la mondo.

Komence de 1960 estos donita ĝenerala trarigardo pri ĉio farita okaze de la Zamenhof-Jaro. En la nuna momento estas eble diri, ke multaj punktoj de la programo jam realiĝis. La centraj organoj kaj institucioj de la Esperanto-Movado akurate plenumis siajn taskojn kaj plue faros sian devon ĝis la fino de la jaro. Ankaŭ multaj landaj kaj lokaj organoj de la Esperanto-organizaĵoj — bedaŭrinde ne ĉiuj ĝis nun — bone realigas sian parton de la Programo.

Rezulte, en la tutmonda gazetaro jam aperis granda nombro da artikoloj pri D-ro Zamenhof kaj multaj informoj pri la Zamenhof-Jaro. Okazis radioelsendoj en pluraj landoj. Pliaj stratoj aŭ placoj ricevis en tiu ĉi jaro la nomon de Zamenhof. UNESKO interesiĝis kaj publikigis artikolojn pri la aŭtoro de Esperanto. Pollando eldonis pro la datreveno specialajn poŝtmarkojn. En la ŝipkonstruejo de Split (Dalmatio) granda pola ŝipo estas solene baptita per la nomo de Zamenhof. La Universala Kongreso en Varsovio estis turilate vere mondformata evento.

Nun alproksimiĝas la dua kaj ĉefa kulmino de la tuta Zamenhof-Jaro: la datreveno mem. Por ke ĝi estu efektive digne kaj altnivele festata en la tuta mondo estas necese intensigi la laboron. Por tio la ĉefan respondecon havas la landaj asocioj, la lokaj grupoj kaj la unuopuloj. Ne eblas nun ĉi tie ripeti la taskojn. Oni trastudu ankoraŭfoje la Programon publikigitan en la decembra numero de ESPERANTO 1958, kaj en la Jarlibro 1959, p. 16. Ĉiuj agi laŭ la principoj entenitaj en ĝi, ĉar nur tiamaniere ĝi povas esti plene realigita en kadroj mondaj. Estas ankoraŭ tempo por prizorgi aperigon de artikoloj, okazigon de prelegoj, nomigon de stratoj kaj placoj, publikigon de memorigaj poŝtmarkoj kaj organizon de imponaj publikaj solenaĵoj la 15-an de decembro aŭ iun tagon tre proksiman al tiu dato.

Estas precipe grave atenti, ke la diversaj solenaĵoj estu organizitaj ne nur interne de la Esperanto-asocioj kaj societoj, sed ankaŭ de diversaj edukaj, sciencaj, kulturaj kaj aliaj institucioj. Zamenhof estas personeco de monda formato, kiu apartenas al la tuta homaro, kaj ne nur al la esperantistaro. La centjaro de lia naskiĝo devas tial esti festata de la tuta kultura mondo.

I. L.

eltroviĝemajn propagandistojn, instruistojn laŭ rekta metodo kaj organizantojn kun sperto en tiu fako. La personoj kiuj dezirus partopreni tiun agadon, sed ne havas ankoraŭ sperton pri informa, instrua aŭ organiza laboro, ili klopodu akiri tiujn spertojn en sia hejmlando aŭ iu najbara lando.

Sed la aktiva partopreno ne estas la sola maniero kontribui al la sukcesa universaligo de Esperanto. UEA momente povas antaŭvidi nur tre limigitan sumon al la agado de APO. Tiu sumo povas esti pli-grandigita per personaj kontribuoj al la kaso de APO pere de la C.O. Multaj sindonemaj amikoj jam kontribuis al tiu kaso, helpante tiel nian agadon. Sed pli grandskala apogo pli-grandigus niajn eblecojn. APO akceptos ĉiun, eĉ la plej etan donacon kiel elmonro de simpatio al ĝia laboro kaj ĝiaj celoj.

Nur decida kaj grandskala agado kun la kunhelpo de ĉiuj povos disvastigi Esperanton en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj sociaj tavoloj.

Esperanto estos plene universala nur tiam, kiam en niaj kongresoj estos reprezentataj ĉiuj nuancoj de la kolorriĉa skalo de la loĝantaro de la kvin kontinentoj. Nur tiam ni kun rajto povos pretendi ke la internaciaj organizoj kaj fakaj kongresoj kaj konferencoj adoptu la Internacian Lingvon. Nur tiam ni troviĝos sur la sojlo de la fina venko.

La vojo estas klara kaj ni ekmarŝis ĝin. Ĉu vi kunhelpos por venki la malfacilaĵojn ?

Tibor Sekelj



Ambaŭ fotoj de la
Universala
Kongreso en
Krakovo, 1912.



1. d-ro Zamenhof
2. s-ro M. B. Mudie,
prez. de BEA
(Britujo)
3. s-ro M. Rollet,
prez. de SEPE
(Francujo)
4. s-ro M. Silbernik,
bofrato de
d-ro Zamenhof

Poemo voĉlegata de Julia Baghy dum
la Zamenhofftago en Varsovio :

Centjara estus jam la koro

*Centjara estus jam la koro
de l' homarano, kiu arde
sopiris, brule de fervoro,
ke homo homon fratrigarde
renkontu kaj ke paco-garde
la gentoj vivu en konsento
kaj ilin guidu verdstandarde
per nova vort' la Nova Sento.*

*Kaj tiu kor' ne mortis tuta !
Ĝi vivas inter ni konstante !
En nia voko pac-saluta
li vokas mem pac-salutante !
La lingvo vivas verse-kante,
postvivis lin per kvardek jaroj,
kaj tra jarcentoj diamante
lin fajlos plu fidelaj aroj !*

*Ĉi tie, en la lando, kie
li vivis age kaj produkte,
mi diru, iom elegie
kiel li ĝojis bonafrukte,
kaj kiel ĝemis pene-lukte
en la mondrulo katastrofa.
Aŭskultu, karaj, senterupte,
pri ĉi BALADO ZAMENHOFA.*

Balado

*Kiam li antaŭ sepdek jaroj
l' Unuan Libron ekkaregis,
kaj inter liaj okulharoj
grandguta ĝojolarmo mezis :
la Verk', por kiu li elspezis
ĵunaĝan ĝojon, staris brile,
ekkanti al li tre necesis :
"Ho kor', ne batu maltrankvile !"*

*Kaj kiam, malgraŭ ĉiuj baroj,
l' Afero kreskis kaj progresis,
kaj jam entuziasmaj aroj
en Bulonjo sur Mar' kongresis,
mirakla sento lin impresis,
kaj krii volis li jubile :
sed gorgopremo ne permesis :
"Ho, kor', ne batu maltrankvile !"*

*Kaj en la tempo de l' amaroj,
kiam la mondo murd-ekcesis,
el homa sango kreskis maroj,
ĉiuj esperoj ŝajne ĉesis,
al koro, kiu tiel pezis
en brust' spiranta malfacile,
la lastan peton li adresis :
"Ho, kor', ne batu maltrankvile !"*

*Vin mil-mil langoj ne forgesis
Majstro, sed ĝemas ni simile
nun, ĉar la mond' atomarmile
sin minacante refrenezis :
"Ho, kor', ne batu maltrankvile !"*

Kolomano Kalocsay

La Internacia Lingvo kiel Belarta Tradukilo

Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de

L. L. Zamenhof

verkita por C.E.D. de William Auld

I.

La interkompreniĝo de la popoloj, neniam pli urĝe dezirinda ol en la nuntempa malgrandiĝanta mondo, devas okazi grandparte per la interŝanĝo kaj reciproka ekkono de la kulturaj valoroj kreitaj de tiuj popoloj. Kaj tamen tiu interŝanĝo estis ĝis nun grandparte neebla pro la lingva diverseco de la homaro. Pere de la literaturo de iu popolo, tiuj, kiuj kapablas ĝin legi, povas konstati ne nur la supraĵajn apartaĵojn de tiu popolo, sed ankaŭ, pli grave, ĝian fundamentan homecon kaj similecon al la aliaj popoloj. Ne pro sia grekeco Odiseo fariĝis universala simbolo, nek pro sia angleco Hamleto, nek pro sia hispaneco Don Kihoto, sed ĉiuj univertsaliĝis pro la fundamenta homeco de sia karaktero. Tamen nur malmulte ili fariĝis konataj tra la tuta mondo en sia nacilingva vestaĵo, sed ĉefe per transvestiĝo en alilingvaj tradukojn. Sen tia tradukado ili restus nekonataj al la pliparto de la mondo.

La sorto de la literaturaj kreaĵoj estas tiurilate hazardoplena: la tradukado en kaj el ĉiuj lingvoj okazas pli-malpli senplane; eĉ se iu verko meritas diskonigon tra la mondo, ĝi devas unue altiri la atenton de alilandaj kompetentuloj; eĉ se ĝin emas eldoni alilanda eldonisto, tiu devas trovi tradukiston, kiu sufiĉe bone regas la koncernan fremdan lingvon; eĉ tiam la originala aŭtoro estas plene en la manoj de la tradukisto — kaj la tradukarto estas unu el la plej malfacilaj. Ne estas nekonate, ke iu verko famiĝis en alilando pere de traduko, kiu funde aliformigis la originalaĵon.

Tiu ĉi problemon konscias ankaŭ Unesko:

"Se tiom da obstakloj kontraŭstaras la eldonon de franca verko en la angla lingvo, kiom pli malfacile estas, kiam temas pri libro originale verkita en la urdua, la punjaba, la siama, la korea, la araba, la norvega, aŭ la portugala....."

"Kiom da eldonistoj en Anglujo aŭ Usono (aŭ, cetero, en Francujo, aŭ Germanujo, aŭ iu ajn el la ceteraj grandaj libro-eldonantaj landoj) havas tri profesiajn legistojn de la punjaba, por fari raporton pri manuskriptoj en tiu lingvo? Aŭ eĉ unu tian legiston? Evidente tre malmultaj. La ĉiujara eldonaĵo de Unesko, *Index Translationum*, montras, ke el la 21,667 tradukoj eldonitaj en la mondo dum 1954, 7,498 estis el la angla, 3,874 el la rusa, 2,870 el la franca — kaj *neniu* el la punjaba.

"Kaj tamen, kiel estas vere pri multaj el la lingvoj de Hindujo, kaj efektive pri multaj el la tiel-

nomataj 'lingvoj malmulte disvastigitaj' de la mondo, la punjaba lingvo posedas literaturon, kiu kapablas aldoni riĉojn al la komuna kulturtrezoro de la mondo, kaj tial meritas tradukadon en la pli vaste parolatajn lingvojn....."

"Unu el la taskoj de Unesko, en la kadro de ties pli larĝa celo diskonigi inter ĉiuj aliaj landoj la kulturon de ĝiaj unuopaj Membro-Ŝtatoj, estas la klopodo trarompi la 'tradukan kurtenon', kiu kaŭzas la preskaŭan nekonatecon pri la literaturo de tiel multaj landoj ekster ties naciaj landlimoj". (1)

Trafe konstatinte la situacion, kiajn paŝojn entreprenis Unesko por ĝin ŝanĝi?

"Kiel parton de tiu entreprenaĵo, nomita 'la Programo de Tradukado de Repraŝentaj Verkoj', Unesko gvidas projekton pri la tradukado en la anglan kaj la francan de libroj originale verkitaj ne nur en la punjaba, sed ankaŭ en multaj aliaj 'lingvoj malmulte disvastigitaj'. (2)

Laŭ tiu projekto, ĝis junio 1957, 8 tradukoj el 4 lingvoj estis eldonitaj en angla lingvo, kaj 24 tradukoj el 9 lingvoj (kun 1 antologio el 18 lingvoj) estis eldonitaj en franca lingvo. Estis plue preparataj ankoraŭ 20 libroj el 9 lingvoj en angla traduko kaj 39 libroj el 17 lingvoj en franca traduko. Krome, estis eldonitaj aŭ preparataj tradukoj el 5 okcidentaj lingvoj en la araban aŭ persan, kaj ankaŭ unusola traduko el la araba estas eldonita en hispana lingvo. Unuavide tio ŝajnas sufiĉe ampleksa kontribuo al la internacia interkonigo, kaj certe oni povas nur laŭdi la intencon de la projektintoj. Estas notinde, tamen, ke "plenumigante la tradukprogramon, Unesko estas limigita, kiel de sia budĝeto, tiel ankaŭ de la manko de kompetentaj tradukistoj" (3). Simila manko, cetero, estas sentebla ankaŭ en aliaj kunteksto; ekzemple, la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj havas "precize unu anon, kiu interpretas el la ĉina kaj nenium, kiu kapablas interpreti en ĝin" (4).

Se do ni objektivite rigardas la ĝeneralan mond-situacion, ni povas fari kelkajn bazajn konstatojn. Interkonigo de la kulturaj valoroj okazas pere de tradukado. Se ni rekonsideras la supre cititajn ciferojn el *Index Translationum*, ni trovas ke en 1954, 34.6% el ĉiuj tradukoj estis el la angla lingvo, 17.9% el la rusa, kaj 13.2% el la franca. Tio signifas, ke 65.7% el ĉiuj tradukoj estis el tiuj tri lingvoj, kaj sekve nur 34.3% estis el *ĉiuj aliaj lingvoj de la mondo kune*. Videble la aktuala situacio tre favoras tiujn verkistojn, kiuj kreas en la nomitaj tri ling-

voj, kaj malfavoras tiujn, kiuj kreas en unu el la "lingvoj malmulte disvastigitaj". Tion, cetere, scias ĉiu verkisto de malgranda nacio, kaj tio kelkfoje influas lin elekti kiel sian esprimilon lingvon pli disvastigitan. Tiel, ekzemple, Kafka elektis la germanan prefere ol la ĉeĥan. Tiu ĉi malfavoro rilate al la malgrandaj lingvoj rezultiĝas, almenaŭ parte, el la manko de eksterlandaj scipovantoj de la koncernaj lingvoj, kaj el la eĉ pli sentebila manko de kompetentaj tradukistoj el tiuj lingvoj.

Unesko, kiel la ĉefa interŝtata kultura organizaĵo, rimarkas tiun ĉi malekvilibran situacion, kaj stariĝas projekton por diskonigi la kulturojn de la malpli disvastigitaj lingvoj. Tiucele ĝi tradukigas gravajn verkojn el aliaj lingvoj (ekzemple, la japana, la hispana kaj la itala) en la anglan aŭ en la francan. Ĉu oni povas objekte diri, ke tio serioze plibonigas la situacion? Nu jes, kiam koncernas legantojn en Francujo, Britujo, Nordameriko kaj la respektivaj kolonioj; kaj tio jam estas io. Sed ĝi havas minimume du malfortajn flankojn. Unue, japana verko tradukita en la anglan neniam utilas al germano, finno aŭ italo, krom se li iom posedas la anglan lingvon — kaj eĉ tiukaze li devas legi en fremda lingvo *kies plimultajn nuancojn li ne kapablos kapti*. Literaturaj verkoj estas valoraj grandparte ĝuste pro la lingvaj sugestio kaj nuanceco, kiujn eĉ kompetentaj tradukistoj, perfekte konantaj la du lingvojn, trovas malfacile redoneblaj per traduko; kiom malpli percepteblaj ili fariĝas por leganto, kiu nur mezgrade posedas la fremdan lingvon, kiun li estas leganta! Kaj, malgraŭ kelkaj facilanimaj kontraŭaj asertoj, la nombro de ekzemple germanoj, finnoj aŭ italoj — por eĉ ne menciigi rusojn, ĉinojn aŭ japanojn — kiuj eĉ mezgrade posedas la anglan aŭ la francan estas ridinde malgranda. Ke kelkaj *pretendas* posedi tiujn lingvojn, tio estas alia afero. Ekzistas, kompreneble, certa snobismo koncerne la t.n. "ĉefajn" lingvojn. La kutimo ĉe neesperantistaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj, elekti unu aŭ plurajn el la "ĉefaj" lingvoj kiel "oficialajn" lingvojn donis avantaĝojn kaj prestiĝon al tiuj, kiuj posedas ilin. La ampleksa literatura tradukado el lingvoj "pli multe disvastigitaj" aldonis prestiĝon ankaŭ al tiuj lingvoj, kaj pro tiu kaj aliaj kaŭzoj la literaturoj de la malgrandaj nacioj estas plej ofte ignorataj, kvazaŭ neekzistantaj. Ekzemple, la detala "Historio de Okcidenta Literaturo" de J. M. Cohen (5) dediĉas precize tri liniojn al la hungara poezio, kio, kiel scias ĉiu leginto de la esperanta "Hungara Antologio" (6) k.a., estas absurdaĵo. Kaj tamen, subkonscia supozo, ke ĉio grava kaj valora estas verkita en la pli disvastigitaj lingvoj, jam erarigas multajn alie sagacajn homojn. Oni legas, ekzemple:

"Bibliografio de libroj pri Baudelaire en la ĉefaj lingvoj estintus utila por plua studado" (7).

Tute certe tiu aŭtoro devis esprimi sian intencon jen: Bibliografio de la ĉefaj libroj pri Baudelaire

(t.e., en iu ajn lingvo) estintus utila por plua studado. La tuta senco kaj signifo de la Unesko-projekto troviĝas precize en tio, ke NE ĉio kulture valora estas verkita en la plej vaste parolataj lingvoj!

Kaj tamen dua malfortaĵo de la uneska solvo estas tio, ke ĝi ne vere forigas la malekvilibron, sed kontraŭe ĝi eĉ pli sentigas ĝin; ĉar kion fakte ĝis nun faris Unesko per sia tradukprogramo estis tio, ke ĝi pliriĉigis la anglan kaj la francan je kosto de la aliaj lingvoj! Por esti konsekvenca (por ne diri: justa), Unesko devus tradukigi sian elektitan verkon el malgranda literaturo en *ĉiujn aliajn lingvojn*, ĉar nur tiel ĝi evitus favorigon de la jam favoritaj "grandaj" lingvoj kaj samtempe *fakte* diskonigus la literaturon al ĉiuj popoloj. Evidente tio estus — por Unesko — neebla; kaj tial ĝi elektis tiun alternativan vojon, kiun ĝi efektive sekvas. Tamen, de tempo al tempo io simila ja okazas: kelkfoje iu libro furoras, kaj per privata iniciato de individuaj eldonistoj aperas tradukite en eble kvindek lingvojn; tamen tio estas malofortaĵo, kaj, se ni estas sinceraj, eĉ pli malofte tio koncernas la kulture plej valorajn kaj eternecajn verkojn. Cetere, la pretigado de kvindek diversaj tradukoj (ofte ne el la originalo sed faritaj laŭ alilingvaj tradukoj) malŝparas multe da laboro kaj rezultiĝas tre diverskvalitajn tradukojn, tiel ke unu nacio estas bonŝanca kaj ricevas taŭgan tradukon, dum alia estas malbonŝanca kaj ricevas fuŝan. Ĉiukaze, oni vidas, ke la situacio estas ĝenerale ĥaosa.

Konsiderante, ke Unesko elektis la anglan kiel unu el la du lingvoj en kiujn ĝi tradukigas la trezorojn de "malpli disvastigitaj" lingvoj, kaj konsiderante la grandan prestiĝon de tiu lingvo en la mondo — kion atestas interalie la fakto, ke 34.6% el ĉiuj tradukoj estis faritaj el tiu lingvo en unu jaro — oni emas supozi, ke la anglalingvanoj estas aparte favoritaj ankaŭ rilate la koneblecon de aliaj literaturoj pere de tiu lingvo. Ankaŭ tiurilate la realaĵo meritas iom da atento. Ni turnu nian atenton al periodo de du jaroj, kaj al Britujo. (Praktike, usonaj eldonaĵoj, kaj eldonaĵoj de aliaj anglalingvaj landoj, ne atingas la ĝeneralan publikon en Britujo). Laŭ Index Translationum, en unu dujara periodo (8) estis eldonitaj en Britujo sume 353 tradukoj de literaturaj verkoj en la anglan lingvon. El tiuj tradukoj, 153 estis el la franca; 65 el la germana; 24 el la itala; 17 el la rusa; 10½ el la greka (antikva kaj moderna); 9½ el la latina; po 9 el la dana kaj hispana; po 6 el la nederlanda, portugala kaj sveda; 5 el la norvega; 4 el la ĉina; po 3 el la finna kaj japana; po 2 el la ĉeĥa, la islanda, la jida, la pola kaj la ukraina; kaj po 1 el la bengala, la estona, la flandra, la hebrea, la hungara, la irlandia, la kimra, la kornvala, la persa, la rumana, la slovena, la turka kaj la urdua — entute 33 lingvoj. Ni rimarkas, do, ke 43.3% de la tradukoj estas el la franca lingvo. La franca kaj

germana kune formas 61.8% de la tuto; sekve la 31 aliaj lingvoj kontentiĝas per 38.2% inter si, kaj ili inkluzivas ankaŭ plurajn "gravajn kulturlingvojn": la itala (6.8%), la rusa (4.8%), la hispana (2.6%) kaj la japana (0.8%). Oni ne povas diri, ke la brita leganto ricevas tre ekvilibrantan panoramon super la mondliteraturo! Kompreneble, multe kontribuas al tio ĝuste la fakto, ke la franca lingvo estas ĝenerale bone komprenata de edukitaj britoj, kaj ke sekve troveblas relative multaj tradukistoj por tiu lingvo.

La supraj konstatoj neniel enkalkulas la nivelon de la koncernaj tradukoj. Manko de taŭgaj tradukoj eĉ de multaj mondaj ĉefverkoj estas agnoskata de ĉiuj literaturistoj. Pro tio, ekzemple, Cohen (9) opinias, ke "la ideala formo de angla versio estas, laŭ mia opinio, tiu... (en kiu) la originalo estas trovebla apud, aŭ senpere super, la traduko. La leganto tiel povas trairi la verkon en la originala lingvo, tamen helpi al si de tempo al tempo per sinturno al la tradukinto, kies netrudigema devotiam estas, prezenti la plej eble laŭvortan parafrazon". Kiel oni tuj vidas, tia metodo postulas ĉe la leganto sufiĉe altan gradon de kompreno de la originala lingvo, kaj estas senespece neebla en la granda plimulto de kazoj.

El ĉio ĉi sekvas, ke la sola racia solvo de urĝa kaj komplika problemo estas la tradukado de ĉiuj gravaj verkoj en unu lingvon, nacie neŭtralan kaj facile alproprigeblan de ĉiuj popoloj, t.e., en la internacian lingvon, Esperanton. Nur tiamaniere la malpli disvastigitaj lingvoj ĝuas kulturegan egalecon kun la pli disvastigitaj. Rosbach trafas skizis la problemon kaj ĝian solvon:

"W. Somerset Maugham skribas ie: 'Se vi ne dediĉas vian tutan vivon al tio, vi neniam lernos paroli perfekte la lingvon de alia nacio; vi neniam konos intime ĝiajn popolojn kaj literaturon. Ĉar ili, kaj la literaturo, kiu estas ilia esprimo, estas la rezulto ne nur de la agoj, kiujn ili faras kaj la vortoj, kiujn ili uzas, el kiuj neniuj estas malfacilaj, sed de prapatraj instinktoj, nuancoj de sento, kiujn ili absorbis per sia patrino lakto, kaj naturaj kondutoj, kiujn povas la eksterlandano neniam tute kapti.'

"Ĉi tiuj vortoj de la granda angla aŭtoro... klare reliefigas la signifon de *Esperantaj* antologioj pri la diversaj nacilingvaj literaturoj. En tiaj antologioj homoj mem el la koncerna lando, kun la koncernaj ecoj menciitaj de Somerset Maugham, tradukas la literaturon, kiun ili tiel bone kaj kone komprenas, ne en alian nacian lingvon, kiun ili ne absorbis kun la patrino lakto, sed en la *simplan, flekseblan, belsonan* lingvon internacian." (10)

Jam sufiĉe multaj verkistoj komprenis la gravecon de Esperanto kiel peranto de literaturo. El abundaj diraĵoj necesas ĉi tie citi nur unu, specimene. Bulgara verkisto Vladimir Poljanov skribis: "Mi opinias, ke Esperanto estas la plej bela

eblaĵo (t.e. la plej bona rimedo) por malgrandaj popoloj, kiel la nia, popularigi siajn spiritajn valorojn ĉe la manko de intereso al ilia gepatra lingvo flanke de la aliaj popoloj". (11)

Jam de pluraj jardekoj la esperanta solvo de la lingva ĥaoso, ankaŭ sur literatura kampo, perfekte funkcias. Multaj gravaj literaturaj verkoj el la plej diversaj lingvoj estas tradukitaj en Esperanton kaj tiel diskonigitaj tra la tuta mondo. La tradukoj, faritaj de kompetentuloj, kies gepatra lingvo estas la originala lingvo de la koncerna verko, estas legataj ofte en pli ol 80 landoj samtempe. Kiaj estas tiuj tradukoj, kaj kiaj estas la ecoj de Esperanto kiel literatura tradukilo?

SUBNOTOJ.

- (1) The Unesco Courier, junio 1957, p. 5-6.
- (2) loko cit. sub (1).
- (3) loko cit. sub (1).
- (4) "Tio, kion la plimultaj homoj jam delonge suspektis vera, nome ke la angla jam fariĝis 'la plej uzata' lingvo en la hodiaŭa mondo, estas nun konfirmita de la ĝenerala asambleo de la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj, kiu loĝas en Ĝenevo. Oni parolas, kompreneble, nur pri diplomacia interkomunikigo. Se oni komencus kalkuli la nombron da personoj, kiuj povas paroli nur la ĉinan, estas verŝajne, ke la taksado estus alia. Sed la ĉinoj ne multe interesiĝas pri la diplomatio, kio estas feliĉaĵo, ĉar (laŭ la sama raporto) la asocio havas precize unu anon, kiu interpretas el la ĉina kaj neniun, kiu kapablas interpreti en ĝin." — The Glasgow Herald, 24.2.1958.
- (5) J. M. Cohen: A History of Western Literature. Londono, 1956.
- (6) K. Kalocsay (red.): Hungara Antologio. Budapeŝto, 1933.
- (7) K.R.C. Sturmer: Third Programme Esperanto. (The British Esperantist, 1957, p. 118).
- (8) Index Translationum, Vol. 8 (1957) kaj Vol. 9 (1958).
- (9) loko cit. sub (5), p. 355.
- (10) Johan Hammond Rosbach: Norvega Esperantisto, 1959, p. 30.
- (11) Literatura Mondo, 1923, p. 165.

Grupestroj !!

Bonvolu sendi al la Centra Oficejo de U.E.A. informojn pri nomo, adreso kaj kunvenhoroj de via grupo por la listo en Jarlibro 1960 (vidu p. 484 k.s. en Jarlibro 1959).
Prezo: unu dekonono de jarkotizo MA.

Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj

Frostavallen kontribuis al la Granda Projekto de
UNESKO

Frostavallen ĉifoje superis sin mem. Ne nur en la Esperanto-Movado, sed ankaŭ ekster ĝi jam estas konataj la altnivelaj kulturaj semajnoj, organizitaj de la Sveda Esperanto-Instituto, Sveda UNESKO-Konsilantaro kaj Sveda Instituto por Kultura Interŝanĝo kun Eksterlando. Sub la modesta titolo "Sveda Somera Semajno" jam la kvaran fojon estis organizita altnivela kultura aranĝo en la idilia regiono de Frostavallen ripoziga por la korpo kaj inspira por tiaspecaj intelekta laboro kaj interŝanĝo de pensoj. Certe, la tuta medio, la komforto, la bela prelegejo kun ĉiuj necesaj aparatoj je dispono de la prelegantoj multe kontribuis al la plena sukceso de la ĉijara aranĝo, la plej elstara kaj plej grava el ĉiuj ĝisnunaj.

La ĉefa organizanto, Sinjoro Jan Strönné, fiksas la programon interkonsente kun la ĝenerala sekretario de U.E.A. konforme al la kunlaborado de U.E.A. kun UNESKO pri la t.n. Granda Projekto pri Reciproka Apezado de la Orienta kaj Okcidenta Kulturaj Valoroj.

En la unua prelego Prof. D-ro Ivo Lapenna parolis pri tiu projekto, kiun UNESKO realigas dum dek jaroj. Li prezentis la kaŭzojn, pro kiuj UNESKO donis al tiu demando la rangon de granda projekto, ĝian celon kaj la metodojn, laŭ kiuj diversaj UNESKO-instancoj realigas ĝin en la praktiko. En la dua prelego Prof. Lapenna parolis pri kelkaj karakterizaj trajtoj de la kultura vivo kaj moroj en la landoj de orienta kaj okcidenta Eŭropo. En la lasta lekcio de la serio la sama preleganto parolis pri la rolo de la Internacia

Lingvo en la realigo de la projekto, pri la ĝisnunaj laboroj de U.E.A. sur tiu kampo kaj pri la planoj por la proksima estonteco.

Prof. D-ro N. Kawasaki, fama lingvisto el Osaka (Japanujo), bedaŭrinde ne povis persone ĉeesti, sed li sendis la manuskripton de siaj prelegoj, kiujn legis, donis klarigojn kaj faris aldonojn S-ro Eizo Ito (Japanujo). La unua prelego pritraktis la demandojn kiel la eŭropaj ideoj — kristanismo, filozofio, scienco — influis la japanan socion. Tre interesa estis la dua prelego, en kiu estis prezentitaj kelkaj fundamentaj trajtoj de la japana lingvo, precipe en komparo kun la hindo-eŭropaj lingvoj. En la tria prelego estis traktata la demando ĉu la japana lingvo apartenas al la familio ural-altaja, aŭ al la familio indonezia, aŭ al la hindo-eŭropa.

Lic. Tibor Sekelj faris tri prelegojn, kiujn li abunde ilustris per lumbildoj. La konata esploristo parolis pri siaj impresoj el Azio, pri sia pitoreska vojaĝo tra meza Ameriko kaj pri la lingva problemo de Azio. Resumo de tiu lasta prelego aperos en unu el la sekvantaj numeroj de "ESPERANTO".

Doc. S. Pragano parolis pri Rumanujo, la lando inter Oriento kaj Okcidento. En la dua prelego li prezentis la modernan kaj tradician Nederlandon. La unua prelego estis ilustrita per lumbildoj kaj al la dua estis aldonita tre interesa filmo pri Nederlando.

Ekster la programo F-ino Aafke Laverman (Nederlando) faris prelegon pri siaj impresoj dum vojaĝo tra Afriko. Per siaj klarvidaj observoj ŝi sukcesis proksimigi tiun kontinenton kaj ĝiajn problemojn al la aŭskultantaro. Teknike bonega kolorfilmo, disponigita de la Sud-afrikaj aŭtoritatoj, elvokis sinceran admiron.

En la neoficiala parto de la programo estis detale pritraktitaj la tri ĉefaj aspektoj de la por-esperanta agado: informado, instruado kaj praktikaj aplikoj. La diskutojn pri la unua temo enkondukis D-ro Ivo Lapenna, pri la dua Doc. Pragano kaj pri la tria S-ro Jan Strönné. Malgraŭ la bela vetero kaj la ampleksa, eĉ iom laciga oficiala programo, tamen la diskutoj pri tiuj gravaj demandoj evoluis en plena salono. La decidoj estos komunikitaj al la



kompetentaj organoj de U.E.A. kaj de la landaj por konsidero. Ĉi tie estu nur dirite ke la "Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo" (publikigita sur la paĝo 186 de la Jarlibro 1959) estas plene rekonfirmita kaj kelkaj novaj sugestoj aldonitaj.

La ĉijara S.S.S. daŭris de la 9-a ĝis 16-a de aŭgusto. Entute ĉeestis pli ol 100 personoj el 13 landoj. Inter ili estis pluraj mondkonataj esperantistoj, kiuj per siaj intervenoj en la debatoj konsiderinde helpis al tiel alta nivelo de la tuta aranĝo.

Kongresraporto pri

Teatro

La festivalan karakteron de la jubilea kongreso sukcese reliefigis tiuj teatraj vesperoj, dum kiuj tri diversaj ensembloj de geaktorj prezentis sian arton al la internacia publiko. La teatra arto havis kaj havas sian unuarangan signifon en la kultur-evoluo de ĉiu nacia lingvo; sekve ĝi havas same gravan signifon por nia internacia lingvo. Pri tio celkonscie atestis la ludo de ĉiuj rolantoj en la tri ensembloj. Malgraŭ tio, ke ili ĉiuj havis gravajn obstaklojn teknikajn pro gigantaj mezuroj de la spektatorejo, malnormala grandeco de la scenejo, akustikaj malfacilaĵoj, elimineblaj per pluraj pendantaj mikrofonoj, tamen ili venkis kaj iliaj art-prezentoj forgesigis la mankon de tiuj scenejaj dekoraĵoj, rekvizitoj, kiuj ĝenerale akcelas la plenan iluzion. Tiurilate pleje malfaciligis la plenumon de la prezentotasko la satira komedio PYGMALION de G. B. Shaw. Oni gratule povis konstati, ke la "Verda Ĉaro" de Julio Baghy, artisma kolektivo de la Esperanta Klubo en Praha, bonege solvis la reĝisorajn problemojn, devenantajn el la malnormalaj mezuroj de la scenejo mem. La ludo de la ensemblo sukcesis krei la necesan etoson kaj teni ĝin lasta frazo de la komedio. La oftaj postscenaj aplaŭdoj de la publiko pruvis, ke la rolantoj konkeris merititan plaĉon. En la ĉefaj roloj s-ino Eva Seemannová, s-roj Pravoslav Sádlo kaj Antoni Seemann prezentis karaktervariajn tipojn vivantajn. En la malpli grandaj roloj bone debutis f-ino Eva Riháčková, s-ro Emil Rybinski kaj ankaŭ la ceteraj geludantoj harmonie adaptiĝis al la prezento por kompletigi la finan sukceson... kaj tiu sukceso estis vere granda kaj plene meritita tiom pli, ke en la ensemblo troviĝas nur unu profesia aktorino kaj unu teatra reĝisoro. La artisma kolektivo konsistas el talentaj amatoroj, kiuj jam forskuis de si la diletantismon.

La dua teatra prezento estis eksterprograma. La *Bulgara Esperanta Teatro* debutis. La ensemblo, konsistanta el tre talentaj profesiaj geaktorj, tre distre, en iluziveka propra dekoraĵo, en laŭtempaj kostumoj el jaro 1890, ludis scenon post sceno de la duakta satira komedio *Ĉasantoj de oficoj* de la eminenta bulgara verkisto Ivan Vazov. La reĝiso-

Oni ne pensu, ke en Frostavallen mankis distraĵoj. Ĉiuvespere estis io alia: filmprezentado, dancado, ŝercoj kaj ludoj. La adiaŭa kabareda vespero estis efektive brila sukceso, por kiu la ĉefan meriton havas s-ro J. Rosbach, kiu organizis ĝin kaj partoprenis en multaj punktoj.

Entute, vere memorinda aranĝo. Frostavallen fariĝis koncepto. Ĝi estu imitata de aliaj en diversaj partoj de la mondo kaj ĝi mem ripetiĝu kiel eble plej ofte.

I. L.

rado, prezento donis impreson pri perfekta arto, ĉar ĉiu rolanto talente kreis sian tipon, tamen — oni ja devas menci — la prononcmankoj ofte ĝenis la tujan percepteblecon de la teksto. Verdire ne ĉe ĉiu rolanto. Dum la ĝenerala artoplena prezento la publiko ofte esprimis per tondra aplaŭdado sian plaĉon. La spacomanko malebligas okupiĝi pri ĉiu rolanto, kvankam ĉiu meritis apartan mencion, tamen mi gratulas al s-ro Konstantin Dimchev, kies dando-figuro estis klasika tiel en gestoj kiel en parolmaniero.

La ensemblo de la *Internacia Arta Teatro* kontribuis al la kompletigo de la amuza parto per prezento de *La friponaĵoj de Skapeno*, triakta komedio de Molière en moderna reĝio. La modernigo iom forprenis el la klasika ĉarmo de la teatraĵo, tamen oni senĝene povis ĝui la prezentoarton, per kiu la talentaj gerolantoj pruvis, ke tiu ĉi — preskaŭ burleskaĵo — de la granda franca majstro de la komedioj sendepende de tempo-ŝanĝo ĉiam sukcesas vekti, konservi la atenton kaj plaĉon de la publiko. S-ro S. Flego en la ĉefrolo prezentis perfektan figuron de la molièra servistotipo; en la patro-roloj s-roj M. Serment kaj I. Fizi eminentadis, en la roloj de la geamantoj E. Glad kaj Jana Ravšelj donis agrablan iluzion kaj s-ro F. Majetiĉ lertadis en rolo de Selvistro. La ensemblo meritis apartan laŭdon pro la klara prononcado, naturtakta parolstilo. La publiko ne avaris montri sian kontenton per aplaŭdoj.

Julio Baghy

Pliaj membroj de la Internacia Patrona Komitato

Laŭ la informoj de Hungarlanda Esperanto Konsilantaro de la 21-a de junio 1959, akceptis eniri en la Internacian Patronan Komitaton por la Zamenhof-Jaro jenaj pliaj personecoj el Hungarujo:

Kossa István, Ministro por Trafikaj kaj Poŝtaj Aferoj, Vass Istváné, Vicprezidanto, Dr. Nezával Ferenc, Ministro por Justico, Dr. Ortutay Gyula, Rektoro de Scienca Universitato, Dr. Rusznyák István, Prezidanto de Scienca Akademio, Darvas József, Prezidanto de Hungarlanda Pac-Konsilantaro.

La Genio de Zamenhof: Efekta Lingvo

Pri efekto en la senfigura senco de la vorto ni kutimas paroli nur en tekniko, pensante pri la efiko ricevita kompare kun la energio uzita. Ĝis niaj tagoj neniu pensis pri tio, ke ankaŭ lingvo estas instrumento de homa agado, pri kies efekto oni povas paroli.

Ĉio, kion ni konas pri la estiĝo de Esperanto montras, ke D-ro Zamenhof pli sekvis intuicion ol teoriajn rezonadojn kaj konkludojn. Intuicie ankaŭ la lernanto de Esperanto estas ravata per la genia konstruado de la lingvo kaj ĝuas pri la rapida progreso, kiun li faras iom post iom ekposedante ĝian sistemon de esprimado.

Same intuicie prijuĝas la pedagogoj la lernadon de lingvoj. Antaŭ nelonge okazis en Stockholm konferenco de la instruistoj de modernaj lingvoj, kie la centra problemo estis la instruado de la angla lingvo. Instrua konsilanto Birger Thoren menciis en sia referato, ke la kompreno de ordinara angla teksto (sen fakaj terminoj) postulas minimume konon de 10.000 vortoj (el la 25.000 plej ordinaraĵoj); el tiuj la svedaj abiturientoj tamen konas nur 7000, kaj eĉ el tiuj nur 3000 aktive, dum la resto, 4000, estas konataj nur pasive, tio estas per la helpo de kunteksto. En la kadro de la nuna instrua plano oni tamen ne povas pligrandigi la kvanton de lecionoj por la angla lingvo, pro kio estus gravege koncentri la instruon al la vere kerna vortaro.

En la citita informo estas pluraj neprecizaj detaloj. Antaŭ ĉio ne estas precizigita, kion signifas "kompreno". Eĉ en "ordinara" teksto kelkfoje — estu tre malofte — aperas vorto kiu ne apartenas al la 25.000 "plej ordinaraĵoj" vortoj, kaj la sola bazo por la prijuĝo de la grado de kompreno estas studo de la kvoto de nekonataj vortoj renkontataj en hazarde elektita, sufiĉe ampleksa teksto. Tio signifas statistikan studon de la lingvo, kiu ja donas ne absolutajn sed probablajn rezultojn, sed tamen multe pli ekzaktajn ol nura intuicia prijuĝo.

Mi ne intencas enprofundiĝi en la detalan studon, pri kiu mi povas aludi al mia studo en "Esperantologio", I.1. (1949). Sed ni faru komparon inter la angla kaj esperanta lingvoj sur la bazo de rezultoj deriveblaj per la vortostatistiko. Por tiu celo mi donas tabelon jenan:

Resto de nekonataj vortoj
en ordinara teksto

	Lernitaj vortoj	
	Angla	Esperanto
16%	1400	550
10	2350	790
7	3000	965
3,2	4700	1400
1,0	7000	2000
0,25	10000	2800
0,15	?	3000

La ekzemplaj ciferoj estas elektitaj parte por povi kompari ne nur saman kvoton de kompreno, sed ankaŭ la efekton ĉe kono de sama vortrezoro.

La supre citita plej granda nekompreneo (16%) signifas ja tute nekontentigan staton de kompreno: la legado de verko, kie ĉiu sesa vorto devas esti serĉata el vortaro, estas tro peza kaj malkuraĝiga eĉ por lernanto. Sed aliparte, montriĝis, ke eĉ tiel malgranda lingvoscio, se la konataj vortoj vere estas elektitaj el la plej ofte bezonataj, donas la eblecon interkompreniĝi en simplaj, ĉiutagaj temoj. Ĝuste ĉi tie la bezona vortrezoro angla kaj esperanta ne estas strikte kompareblaj, ĉar laŭ la esploroj de Thorndike jam la 850 plej oftaj anglaj vortoj havas sume pli ol 21.000 sencojn, dum la 550 bazaj vortoj de Esperanto estas praktike po unusencaj. Des pli okulfrapa estas la konstato, ke jam tiu vortnombro, 1400, kiu en angla lingvo sub certaj kondiĉoj donas la eblecon al apenaŭ kontentiga ĉiutaga babilado, en Esperanto sufiĉas por facila legado de ordinara teksto (3,2% da nekonataj vortoj, el kiuj la plej multaj estas tn. internaciaj kulturvortoj).

Se ni nun revenas al la referato de Thorén, la svedaj abiturientoj (versajne tiuj, kiuj bone progresis en la studo de angla lingvo) aktive posedas 3000 vortojn kaj kapablas laŭ la kunteksto diveni la sencan de pliaj 4000. Per tio ili atingas tion, ke la mankanta kompreno restas ĉe 7%, rezulto, kiu en Esperanto estas ricevebla per la kono de malpli ol mil vortoj. Se ni kuraĝas supozi, ke la plej intelektaj lernantoj pli-malpli posedas la 10.000 vortojn, kun ili povas en Esperanto konkuri lernanto, kiu konas 2800 vortojn. La rezulto, nekompreneata resto de 0,25% (2-3 vortoj el mil tekstvortoj), fakte jam signifas posedon de la lingvo. Sed se oni en la lernejo povas atingi la aktivan konon de 3000 anglaj vortoj apud la enkapigo de ĝia gramatiko (12424 formoj laŭ Thorndike) kaj vasta kolekto de fiksjaj dirmanieroj, kiom pli certe oni atingus la aktivan posedon de 2800 esperantaj radikvortoj, apud ĝia simpla gramatiko kaj vortfarado, sen la fiksjaj frazkonstruoj.

Ne estas necese en ĉi tiu okazo studi la rimedojn, per kiuj la efekto de Esperanto estas atingita. Sufiĉas al ni konstati, ke ĝi estas, baze de la vortaro sole, kelkdekoble pli granda ol la efekto de angla lingvo, kiu tamen ĝenerale estas konsiderata unu el la plej facilaj el la historie evoluintaj lingvoj.

La fakto, ke Zamenhof atingis tian rezultaton surbaze de intuicio, klare pravas la genion de lia spirito.

Vilho Setälä (Finnlando)

Amikoj kun la tuta Mondo

Infanoj el 12 landoj montras kiel eblas fari ponton
inter Oriento kaj Okcidento.

Jam dum jaroj la gelernantoj en Vibenshus lernejo, Kopenhago, scias, kio estas Esperanto, kvankam neniam per rekta propagando, sed ĉiam per monstro de la praktika valoro de la lingvo en ordinaraj lecionoj, ĉu por interŝanĝo de desegnaĵoj aŭ kontribuado al la granda japana infanverko "Infanoj de la Mondo", ĉu por lerneja partopreno en la interesaj infangazettrondoj de "Graĵnoj en Vento" aŭ por simpla interŝanĝo de diversaj studobjektoj kun kamaradoj en la tuta mondo.

Antaŭ la somerferio mi ĵus finis 2-jaran eksperimenton, en kiu Esperanto ludis gravan rolon kiel rimedo por havigi al lernantinoj en senekzamena, mezgrada klaso la plej "vivantan" instruadon pri la geografio per interŝanĝo de geografia dokumenta materialo, ellaborita de la infanoj mem.

Per Esperanto mi volis montri, ke mi povas vigligi la tro koncizan lernolibron, doni la plej aktualaĵojn kaj ĝustajn geografiajn faktojn kaj tiel aktivigi la jam lerneĵ-lacajn junulinojn en aĝo de 13-15 jaroj.

Detala raporto pri la eksperimento estas en dana lingvo sendita al la superaj lernejoj en Danlando kaj al la plej gravaj tagĵurnaloj, el kiuj cetere multaj favore priskribis ĝin.

Mi kompreneble sekvis la instruplanon, kiu por la unua jaro de la koncerna klaso estas la kontinentoj ekster Eŭropo kaj por la dua jaro nia propra lando, tiel ke la infanoj en la unua periodo ĉefe ricevis geografiajn dokumentojn de la fremdaj kontinentoj kaj en la dua periodo mem verkis pri Danlando.

La tekstoj por nia geografia labormaterialo estas ĉefe verkitaj de la infanoj mem, sed tradukitaj de la instruistino en Esperanton, ĉar al la koncerna klaso oni ne instruis tiu ĉi lingvon. La materialon ankaŭ kolektis la infanoj mem.

Poŝtkartoj, diversaj etaj kolektobjektoj kiel ekzemple poŝtmarkoj kun geografiaj motivoj kaj bildoj de turistbroŝuroj restas propraj de la lernantoj kaj ornamas iliajn laborkajerojn, dum la pli grandaj dokumentoj servas kiel instrumaterialo por la tuta klaso kaj donas bazon por postaj skribaj taskoj aŭ paroladetoj de la lernantoj pri la diversaj temoj. Multobligitaj konturmapoj por ĉefaj geografiaj nomoj, klimatzonoj, k.t.p., formas la pli fakan, sed kompreneble necesan kadron ĉirkaŭ la "vivanta", alsendita materialo.

Anoncelo en Esperanta gazeto donis sufiĉan materialon por la 2-jara eksperimenta laboro. 11 landoj en preskaŭ ĉiuj kontinentoj sendis tre am-



Mia amikino! Japana infandesegnaĵo.

pleksan materialon. Varman dankon mi sendas al ĉiuj gekolegoj, esperantistoj, kiuj helpis al ni, per granda aŭ malgranda kontribuo, tiel ke nia eksperimento fariĝis sukceso!

Lernejo en Necochea, Argentino, sendis tre variajn kaj riĉenhavajn materialojn. Granda, ligna modelo de la haveno en Necochea kaj ampleksa kolekto de belaj argilaj skulptaĵoj, kopioj de indiana arto, manlaboroj de argentinaj lerneĵoj, multe imponis al ĉiuj. La lertaj argentinaj gelernantoj ankaŭ faris grandegajn murmapojn pri ekz. mineraloj, vivo de plantoj kaj bestoj, ĉefaj produktoj, krom monografio pri Antarktiko. Amaso da belaj, memfaritaj librokajeroj ilustras la vivon de la nunaj loĝantoj en Argentino, kaj specimenoj de ekz. la grenkulturado riĉigas nian scion pri tiu fora lando.

Sed plej bone: La lernejo en Necochea sendis vivan simbolon pri nia amikeco. Instruistino, f-ino Renée Christiansen, argentina esperantistino el dana familio, subite staris en nia klaso kun koraj

salutoj de niaj argentinaj amikoj! Ni havis multajn demandojn al ŝi, kaj nia gasto vigle parolis pri Argentino. Ŝi eĉ instruis al la danaj infanoj suĉtrinki argentinan teon, mateon, el komuna ujo. Vere neforgesebla travivaĵo por ili.

Memkompreneble la danaj knabinoj post tiu vizito tre energie komencis prepari sendaĵojn de danaj specialaĵoj al la argentinaj kamaradoj. Menciindaj estas kelkaj el la danaj rekompencaj laboroj, nome tipe danaj brodaĵoj kaj 9 pupoj en tre belaj naciaj kostumoj; ĉion faris la knabinoj mem. En kaj Necochea kaj Kopenhago ni faris lernejekspoziciojn pri la argentina-dana amikeco.

Brazilo ĝojigis nin per bonegaj priskriboj de la produktado de kafo, kakao kaj sukero. Urugvajo kaj Gvatemalo sendis al ni belan kolekton de koloraj poŝtkartoj kaj broŝuroj.

Speciale menciindaj estas la multegaj poŝtmarkoj kun geografiaj motivoj, kiuj venis de la tuta mondo, kaj kiuj donis ne nur ĝojon al la multaj kolektantoj inter la infanoj, sed ankaŭ eblecojn por studoj dum horoj. La temoj estas tre variaj: Elefantoj en Hindujo, fiŝkaptado per kormoranoj en Japanujo, bestoj en Tasmanio, bambuo el Vietnamio, profesioj en Nov-Zelando k.a. El Usono venis multaj kontribuoj pri la historio de Ameriko. Feliĉe ni mem povis rekompenci per bela historia serio kun Esperanto-klarigo: "10 danaj poŝtmarkoj rakontas geografion kaj historion pri Danlando tra 1000 jaroj".

La plej ampleksan interŝanĝon ni havis kun 3 lernejoj en Japanujo.

La subskribinto laŭ deziro de Japana Esperanto-Asocio enkonduke tradukis kaj peris korespondadon inter la princoj Mikasa de Japanujo kaj Axel de Danlando, pri la renkonto de la princoj en preterpasantaj flugmaŝinoj super la nordpolusa regiono dum la unua flugado Kopenhago-Tokio de "Skandinavia Aerlinia Sistemo".

Tre interesa temo de la plua japan-dana interŝanĝado estis studo de la geografiaj lernolibroj por la du landoj kun reciproka kritiko al la temoj kaj la ilustraĵoj. Kion rakontas japana lernolibro pri Danlando? Kion rakontas dana geografia libro pri Japanujo? La rezulto: Japanaj gekolegoj povas fieri pro tute precizaj, kvankam mallongaj klarigoj pri Danlando, dum ni devas iomete honti pro arkaj kaj ilustraĵoj en la danaj lernolibroj rilate Japanujon.

Japana kolego cetere sendis al nia lernejo japanan florŝemon, el kiu kreskis belegaj papavoj, kaj samtempe petis al mi sendi similan donacon kiel dankon de simpla japano al veterinaro David Knudsen, frato de dana ŝipmaŝinestro, kiu pereis savante japanan mariston ĉe la japana marbordo.

Abundas la japana materialo: Fabele belegaj infandeseĝnaĵoj rakontas pri moroj kaj festoj en Japanujo, sed ankaŭ pri la japana laboristo en fabriko kaj rizkampo ni havas bonegajn priskribojn.

Nun ni pli bone komprenas, el kio venas la silko.



Tiu valora kontakto inter Japanujo kaj Danlando montras, ke jam en la elementa lernejo la geinstruistoj povas fari pozitivan laboron en la spirito de la granda projekto de Unesko: Interŝanĝo de orientaj-okcidentaj kulturaj valoroj, ĉu elektante unu aŭ plurajn landojn por sia interŝanĝo.

Alia lando orienta, Indonezio, kontribuis per specimenoj de rizo, maizo kaj oleo-plantoj. Ĉina instruisto sendis multkolorajn poŝtkartojn.

Belaj kajeroj, faritaj de aŭstraliaj infanoj, rakontas pri la naturo de Aŭstralio, la karakteriza bestmondo tie, la sovaĝe kreskantaj plantoj, la vivo kaj primitiva arto de la indiĝenoj kaj fine pri la nuntempa Aŭstralio.

De Nov-Zelando venis belega kopio de vestaĵo de Maori-virino. La kopion faris kaj sendis knabino de Nov-Zelanda lernejo. Ĝi estas tiel bele farita, ke ĝi meritis lokon en la etnografia muzeo de Kopenhago.

La ĝojo inter la lernantoj ĉiam estas granda, kiam la poŝtisto portas la grandajn interesajn pakaĵojn de la fremdaj landoj en la klason, kaj la ĝojo pro la propra rekompenc-laboro ne estas pli malgranda. La infanoj mem baptis la eksperimenton: *Amikoj kun la tuta mondo.*

Hejme aŭ en grupoj en la klasĉambro la knabinoj ellaboris sian rekompencan materialon kun temoj plej ofte elektitaj laŭ deziro de niaj korespondantoj: Vidindaĵoj en Kopenhago, danaj festotagoj (kristnasko, fastfestoj, pasko, Sankta Johano), ludoj kaj moroj, la dana flago, la dana blazono, danaj grandbienoj kaj kasteloj, dana agrikulturo kun modelo de tipe dana vilaĝo, aŭ ekzemple la vivo kaj fabeloj de Hans Christian Andersen kun divenkonkurso: Ĉu vi konas la fabelojn de Andersen?

La principo por la elekto de materialo ĉiam estas: trovi ion tipan por nia kaj la koncernaj landoj.

La lernejo nun posedas tre taŭgan instrumaterialon por la geografiaj lecionoj kune kun pli frue

Ĉu vi scias, ke en Japanujo estas leporo en la luno? En Danlando estas viro en la luno.





Kopio de Maori-vestaĵo. La bluzo estas bela brodaĵo, kaj la ĵupo estas farita el brulstampa lino.

kolektita materialo de eŭropaj landoj : Polaj popol-kostumoj, silkraŭpoj de Po-valo, vidindaĵoj en Romo, manĝeblaj kaŝtanoj el Francujo, vinrikolto, diverslandaj veterraportoj, urb-plano de Prago k.a.

En nia eksperimento necesis traduki kaj peri, sed se oni kombinas instruadon de Esperanto kun internacia interŝanĝo, kompreneble la utilo estas duoble granda : *rekta kaj persona kontakto kun infanoj en kiu ajn lando*, tute en harmonio kun la nuntempa evoluo de rektaj internaciaj rilatoj en ĉiuj kampoj.

En alia klaso en Vibenshus lernejo, la 4-a elementa, tiu revo realiĝis antaŭ unu jaro, ĉar Lerneja Direkcio de Kopenhago donis oficialan permeson por 2-jara eksperimenta Esperanto-instruado al tiu klaso en la lecionaro mem kombinita kun tia aktiva instruado de geografio.

Por tiu klaso multaj novaj kontaktoj, bazitaj sur la supraj spertoj jam establiĝis je same granda ĝojo por lernantoj kaj gepatroj kiel por la instruistino kaj tiel bone promesas por la estonto.

Roma Thorsen

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 31-a de aŭgusto

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Hispanujo	1999	2643	132.21
2.	Belgujo	1480	1912	129.18
3.	Pollando	6635	8485	127.88
4.	Jugoslavio	5690	7060	124.07
5.	Finnlando	1935	2390	123.51
6.	Britujo	6093	6494	106.58
7.	Usono	2816	2975	105.64
8.	Svislando	1950	2020	103.58
9.	Svedujo	6420	6510	101.40
10.	Nederlando	5119	5058	98.81
11.	Francujo	7066	6850	96.94
12.	Norvegujo	1991	1890	94.93
13.	Italujo	3980	3260	81.91
14.	Danlando	2639	2130	80.71
15.	Germanujo	6951	5315	76.46
16.	Brazilo	8255	3364	40.75

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2390	207.82
2.	Kanado	435	605	139.08
3.	Argentino	615	633	102.92
4.	Islando	270	270	100.—
5.	Sudafriko	215	215	100.—
6.	Aŭstrujo	1360	1345	98.90
7.	Izraelo	255	230	90.20
8.	Portugalujo	615	550	89.43
9.	Novzelando	878	760	86.56
10.	Urugvajo	325	255	78.46
11.	Aŭstralio	1280	1066	78.20
12.	Maroko	457	256	56.02

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro !

Postkongreso en Krakovo

En tiu malnova urbo, kies historio estas konata de la X-a jarcento ni restadis dum la tuta postkongreso kaj pasigis bonegajn tagojn, ĉar la urbo prezentas al siaj vizitantoj tiel multajn vidindaĵojn.

Dimanĉe vespere la urbo bonvenigis ĉiujn postkongresanojn en la Urba Muzik-Teatro, kaj oni prezentis la operon "Halka" de Stanislaw Moniuszka, la fama komponisto kaj kreinto de pola nacia opero. La opero, esperantigita de Anton Grabowski, estis belega okazaĵo kaj pro la kortuŝa temo kaj pro la belaj naciaj roboj de la aktoroj. Ankaŭ la kulisoj estis rimarkindaj, ekz ni estis en montara loko kaj vidis post la sunsubiro kiel la nuboj flug-

pendis sur la hela ĉielo.

La sekvantan tagon okazis vizitado en la unikaj salminejoj en Wieliczka kaj sep etaĝoj malsupre ni vidis kapeletojn kun tre mirindaj bildgrupoj faritaj en la salmuroj. Mi deziras mencii "La geedziĝfeston en Kanan", ĉar rigardante ĝin oni supozas, ke fluas vera vino de la kruĉo. Tie troviĝas ankaŭ figuroj kun diversaj koloroj depende de tiu, en kiu profundo la salo estis. Bellumigitaj lagoj ekzistas eĉ muzeo kie ons povas rigardi, kiamaniere oni laboris en malnova tempo.

La trian tagon okazis rondveturado en la urbo por rigardi la preĝejon de Sankta Maria, de kies turo oni ĉiuhore aŭdas muziksignalojn, kiun viro ludas

al la kvar mondanguloj. En Radio Krakovo oni povas ĝin aŭskulti.

Nun komencis la dua parto de la postkongreso nome la ekskurso al la montaroj Tatry. Per aŭtobusoj ni veturis tra Zakopane, la konata turist-urbo, al Mara Okulo, belega lago situanta pli supre en la montoj. Vespere estis aranĝita popoldancado en Zakopane, kaj ni havis okazon ekkoni la specialajn dancojn de tiu regiono.

Ni bedaŭris, kiam ni devis forlasi Zakopane; sed la okazaĵo, la flosigado tra la breĉoj de la rivero Dunajec, estis interesa kaj neforgesebla kaj vere sukcesplena punkto por la postkongreso.

V. E.

Tra la Mondo

Aŭstrio

Internacia Esperanto-renkonto. En Graz, la ĉefurbo de la aŭstria liglando Stirio okazos en la tagoj de la 3-a ĝis 5-a de Oktobro nunjare renkonto kun jugoslavaj kaj italaj esperantistoj, kiun partopreni estas ge-esperantistoj el aliaj landoj invitataj. La programo enhavas aŭstriaajn kaj jugoslavajn folklorajn aranĝojn. En kadro de ĉi tiu aranĝo okazos ankaŭ la **jar-kunveno** de la "Aŭstria Esperantista Federacio", sabate la 3-an de Oktobro. Nenia aliĝkotizo! Aliĝojn bv. direkti al s-ano Josef Eder, Graz-St. Veith, Eichberg-Stattegg, Stirio, Aŭstrio.

★

La 27-an de majo ĉijare la unua ambasadora konsilisto nome de la ambasadoro en longa parolado menciis la gravan laboron de s-ro Steiner, Vieno, kaj transdonis al li la altan ordenon la meritkrucon de UNUA klaso de la Meritordeno de la germana respubliko.

Brazilo

La brazila registaro asignis subvencion de 250 mil kruzeroj al la Esperantista Kooperativo kun la celo faciligi ties laboron por la disvastigo kaj instruado de la Internacia Lingvo. En la lastaj tempoj ankaŭ la islanda kaj pola registaroj finance subtenis aktivecojn por Esperanto.

★

La 14-an de aprilo 1959 oni oficiale inaŭguris en Fortaleza, Brazilo, "Instituto de Esperanto". Ĝia direktoro estas s-ro Paulo Amorin Cardoso. En la Instituto oni instruas al la 2a, 3-a, 4-a kaj 5-a klasoj po 90 minutoj semajne Esperanton. Gratulon al la esperantista direktoro!

Britujo



En Leicester la esperantistoj sukcesis havi florbedon en publika parko. La bildo montras, kiel bela estas la rezulto.

Danujo

La 15-a de decembro ĉijare estos grandstile festata en Kopenhago. Pre-

legos la prezidanto de U.E.A., prof. G. Canuto kaj la ĝenerala sekretario de U.E.A., prof. I. Lapenna. Klasika muziko estos ludata de konata orkestro, kaj solisto ĉe la piano estos repetitoro de la reĝa teatro. Ministroj, la lernejdirektoro de Kopenhago kaj multaj aliaj gravaj personoj estas invitataj por la festo.

Franco

Franca Kongreso en Tours: Dum la pentekostaj tagoj, kiel kutime, okazis la Franca Nacia Kongreso de Esperanto en Tours. La kongreso bone sukcesis, kaj oni sendis telegramojn al 3 ministroj, nome al

1. "Général de Gaulle, Président de la République Française, Paris."
2. M. Boullouche, "Ministre de l'Education Nationale", Paris.
3. M. André Malraux, Ministre des Affaires Culturelles, Paris.

★

Franca ĵurnalo Nord Eclair aperigas ĉiusemajne informojn pri la regiona kaj internacia Esperanto-movado (respondeculo: L. Giloteaux, 7 rue Saint Saëns, Wattrelos (Nord), Francujo).

Hungarujo

La 16.8. je la 13,40-a horo estis en la hungara radiostacio Kossuth kun Imre Botos interparolo pri la: Artefaritaj Lingvoj. Akcentiĝis la avantaĝoj de Esperanto, rajtingante ĝin kiel Internacia Lingvo, lingvistika, praktika kaj sociologia. La interparolo okazis laŭ la invito de la Hungara Radio.

Japanujo

En pli ol 25 universitatoj kaj kolegioj en Japanujo estas organizitaj kursoj de Internacia Lingvo Esperanto kaj societoj por apliki tiun lingvon. La japana gazeto "La revuo Orienta", (eldonata en Esperanto), informas, ke de post la fino de la milito jam 50.000 japanoj lernis Esperanton. La Internacia Lingvo registras en Japanujo grandan disvastiĝon, ĉefe en universitataj kaj sciencistaj medioj.

Jugoslavio

La 17-an de junio finiĝis en Ljubljana supera kurso por geinstruistoj, kiu daŭris tri lernojarajn kaj gvidis ĝin Jože Kozlevčar en la nomo de Esperanto-Instituto por PR Slovenio. La kursfinintoj faris jam ekzamenon B kaj estas survoje al ekzameno C. Ĉi tiu kurso estis bazo por instruado de Esperanto en la lernejoj kaj kerno por la faka organizaĵo de instruistoj kaj profesoroj (JAPE).

★

Helena Grochulska, edzino de la pola ambasadoro en Jugoslavio, baptopatrino de la novkonstruita pola ŝipo "Zamenhof", tranĉas la ŝnuron, kiu ligas la ŝipon al la bordo. Apud ŝi la direktoro de la ŝipfarejo "Split".



Printempe okazis en Niš la dua kultura Esperanto-festivalo, kiun ĉeestis proksimume 200 partoprenantoj kaj ĉirkaŭ 450 gastoj. La festivalo malfermis la prezidanto de la Serbia Esperanto-Ligo Antoniĵe Sekelĵ. La programo konsistis i.a. el recitaĵoj, popolaj kantoj, muzikaj punktoj, mallongaj teatraĵetoj kaj klasika muziko. Ĉeestis ĵurnalistoj de radio-stacio Niš, kaj li surbendigis la unuan parton de la programo kaj elsendis ĝin dimanĉon posttagmeze, kaj sabate okazis prelego pere de radio-stacio Niš.

Kanado

La 18-an de julio 1959 okazis la solena malfermo de la "Esperanto Domo" en Oakville, Ontario, Kanado. Ĉeestis 22 personoj, inter ili du ĵurnalistoj kaj gasto el Novjorko. Post parolado de la fondinto, s-ro R. Eichholz, pri la taskoj de la domo, oni aŭdis magnetofonan saluton de prof. Lapenna kaj lian paroladon "Omāge al d-ro L. L. Zamenhof". Pri la kulturdomo jam aperis granda artikolo en la "Daily Star", la plej granda tagĵurnalo de Toronto. Sed pli grava sukceso estis sepminuta televida intervjuo de ges-roj Eichholz, dum kiu ankaŭ ilia kvarjara filo, Alko, Esperante rakontis bildhistorieton. La sono de tiu programo estas surbendigita kaj havebla de la Magnetofona Servo de UEA.

Norvegujo

En Oslo oni la 14-an de septembro festis la 100-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. La festo okazis en la aŭlo de la universitato, kie inter la 600 ĉeestantoj ankaŭ estis la urbestro kaj aliaj eminentuloj. La programo estis grandioza. Parolis advokato Ivo Rotkviĉ, Jugoslavio, s-ro d-ro Eiza Ito, Japanujo kaj s-ro lic. Tibor Sekelĵ, Jugoslavio. Inter la

prelegoj estis ludata klasika muziko. Granda sukceso estis la aranĝo.

★

Norvega Esperantista Ligo jarkunvenis en Trondhejmo la 28an kaj 29an de Junio. La kunveno komenciĝis per Zamenhofa solenaĵo: s-ro Ragnv. Rian ludis polan muzikon, s-ro C. Støp-Bowitz, prezidanto de N.E.L., parolis pri Zamenhof, nacilingve pro la invititaj ĵurnalistoj, kaj pola gasto, advokato Ramon Sakowicz, transdonis salutojn de Pola Esperanto-Asocio kaj invitis al la 44-a Universala Kongreso en Varsovio, la urbo de Zamenhof.

La jarkunvenon ĉeestis ankaŭ alia pola gasto, prof. Henryk Kozłowski. Dum vespera festeno advokato Sakowicz transdonis al N.E.L. belan memmedalon pri d-ro Zamenhof, kaj la Ordena Kolegio de N.E.L. honorigis s-rojn Tharald Dybing, Gustav Johannessen kaj Trygve Raimar, nomante ilin Kavaliroj de la 2-a klaso de la Liga ordeno PRO MERITO.

La loka gazetaro ampleksa raportis pri la jarkunveno kaj pri la Zamenhofa solenaĵo.

Pollando

Filio de Pola Esperanto Asocio en Siedlce kun granda ĝojo sciigas, ke sekve klopodoj de niaj esperantistoj, la Estraro de nia urbo, dum la kunsido la 6-an de julio, gvidata de S-ro Prezidanto de Urba Popola Konsilantaro, Alfredo Jakimiak, lia anstataŭanto S-ro Bronisław Kieszkowski kaj Estro de Administra fako S-ro Antoni Dyszy, decidis nomigi unu de urbaj stratoj, — ESPERANTO —. La decido multe helpis favora rilato al nia peto de S-ro Profesoro Jan Jędrychowski, gvidanto de loka Kultura Komisiono.

Al ĉiuj kiu kontribuis nian ĝojegan sukceson nia Filio esprimas koran dankon.

★

Samtempe kun aperigo de la kvina verko en la KOKO-serio: Virino ĉe la landlimo de Marjorie Boulton, la Eldonejo KOKO informas, ke oni en Pollando tradukis la kvaran KOKO-libron: Misterio Minora, originala romano de d-ro F. Szilagy. Ĝi kredeble aperos en 40.000 ekzempleroj dum 1960.

Maristoj: Dum la 44-a Universala Kongreso en Varsovio refondiĝis M.E.R.I.-"Marrondo". Eventualaj interesitoj bonvolu kontakti: s-ro K. Ruig, Pieter de Hoochstraat 50', Amsterdam, Zuid--, Nederlando.

Svedujo

En la kadro de la Skania Foiro (Skånemässan) Klubo Esperantista de Malmö dum pli ol 10 jaroj aranĝis efikan, ĉiam diverstipan ekspozicion pri Esperanto. Ĉijare preterpasis pli ol 125.000 vizitantoj el la tuta lando. Temo pri UNESKO kaj krome komercaj

broŝuroj. Kursaliĝiloj kaj informiloj estis je dispono.

★

La 53-a jarkongreso de SEF okazis pentekoste 1959 en Lidköping kun ĉ. 150 partoprenantoj. Prezidanto por la nova periodo estas Jan Strönné kaj sekretario Harry Törnskog. Okazis diservo en Esperanto kaj ekskurso al la monto Kinnekulle. La venontjara kongreso okazos en Falun.

En decembro 1958 la Stokholma Pacosocieto donis lingvopremion al Anna Alamo-Sandgren, vojaĝanta sekretario de KELI. La premio estas donata ĉiun trian jaron. Antaŭaj premiitoj estas: Paul Nylén, Harald Thilander, Ernfrid Malmgren, Einar Adamsson, Ivo Lapenna.

Urugvajo-Montevideo

La 24.4.59 ĉe la televida radiostacio "La Saeta", la sekcio de Urugvaja Esperanto-Societo, "Junulara Rondo Zamenhof" aranĝis interjuon pri Esperanto, kiu vekis grandan atenton.

Vietnamo

Ĉiam denove aperas pruvoj, ke Esperanto estas neanstataŭebla ponto por transdono de kulturaj valoroj de unu nacio al alia. La revuo "Van Nghê" en Hanoi, ĉeforgano de la Vietnam Unio de Literaturo kaj Arto, alportas en sia 16-a numero la poemon "Kanto de la patrino" de la hebrea poetino Mirjam Schneid, portantino de grava literatura premio Israela. Al la publikigo estas aldonita noto, ke la poemon tradukis el hebrea lingvo en la vietnaman Dao-anh-Kha laŭ Esperanto-teksto de Ota Ginz. Multaj gazetoj en Israelo menciis tiun fakton.

"Kiso de la reĝino", rakonton de la ĉeĥa verkisto Fr. Kubka tradukis en hebrean lingvon Itamar Even-Zohar. La Israela ĵurnalo "Al Hamišmar" reprenis ĝin kun klarigo, ke la traduko estis preparita laŭ Esperanto-teksto de Ota Ginz, aperinta en La Nica Literatura Revuo.

GRAVA SCIENCA REVUO EN BRAZILU APERIGAS RESUMOJN EN ESPERANTO

De sia apero en 1939 la luksa REVISTA BRASILEIRA DE GEOGRAFIA (Brazila Revuo de Geografio) aldonas al la ĉefaj artikoloj resumon en Esperanto.

La Trimonata revuo estas eldonata de la Nacia Konsilantaro de Geografio, kiu estas la geografia alo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko.

Kiel sciante, tiu Instituto alprenis Esperanton kiel lingvon por la korespondado kun eksterlando kaj jam eldonis ĉirkaŭe tridekon da libroj kaj broŝuroj en kaj pri Esperanto.

En sia dudekjara ekzistado la "Revista Brasileira de Geografio"

publikigis rimarkindajn sciencajn studaĵojn en la portugala lingvo kaj ilin sekvigis per resumoj en la Internacia Lingvo por pli bona diskonigo de la koncernaj temoj.

Se oni petos provkzempleron por pruvi la universalecon de Esperanto, sendube oni ĝin ricevos. Adreso de la ĝenerala Sekretario de la Konsilantaro: Prof. Speriđião Faissol — Secretário Geral do Conselho Nacional de Geografia — Avenida Beira Mar, 436 — Ria de Janeiro — Brazilo.

JOURNAL DE MEDECINE DE LYON

De nun la "Journal de Médecine de Lyon" denove regule aperigas siajn resumojn en Esperanto dank'al la kunlaboro de D-ro Albault. Kuracistoj kaj Medicinistoj estas petataj mendi provkzempleron (115 F. sendotaj al: "Journal de Médecine, 52 rue Victor Hugo, Lyon 160-74) kaj gratuli la redakcion. La "J.M.L." estas la organo de profesoroj, agregaciitoj, hospitalkuracistoj kaj praktikistoj de Liono. Ĝi aperas dufoje en ĉiu monato.

PERSONOJ SERĈATAJ

Germanujo

Germana soldato mortis en 1916 en hospitalo pro gravaj vundoj. La flegistino, al kiu li direktis siajn lastajn vortojn, nun serĉas homojn, kiu konis aŭ estas parencoj de Bernhard Letke, Lyck-Kaiser Wilh. Strasse 119, BRS. Batl. IR. 147.1 Rekr. DEP. 22. Eventualajn sciigojn bv. sendi al s-ro Robert LLORENS, Route de Châteauneuf, Montélimar (Drôme), Francujo.

Hindujo

Ĉiuj kiu povas doni informojn pri S-ro Ghoze, bengalo, kiu en 1934 tradukis en Esperanton la Tagoredramon "Poŝtoŝeĵo" (neniam eldonita) aŭ pri S-ro Poška, kiu skribis antaŭparolon al tiu dramo, estas petataj kontakti la Centran Oficejon de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

KOREKTO

En n-ro 6/59, paĝo 110, meza koloneto, post la vorto "kvankam" bedaŭrinde estis forlasitaj la vortoj: "kelkaj membroj de".

INFORMO:

pro manko de spaco mi bedaŭrinde ankaŭ ĉifoje estas devigata ellasi la recenzojn de la novaj libroj. Venontfoje la rubriko denove reaperos. K. Z.

La Utileco de Esperanto por Profesia Rondvojaĝo

de

D-ro Richard H. Osborne, **Docento pri geografio,**
Universitato de Edinburgo, Skotlando, Britujo.

Dum la monatoj septembro-decembro, 1958, mi ricevis permeson foresti de mia universitato por viziti landojn de Centra kaj Orienta Eŭropo kun la celo fari kontaktojn kun samprofesiuloj kaj akiri impresojn pri la landoj mem. Unue mi vizitis Pollandon, kie mi pasigis sep semajnojn, kaj poste mi vizitis la Balkanlandojn, kie mi ankaŭ pasigis sep semajnojn.

Antaŭ la alveno en Pollando mi kaptis la okazon viziti la okcidentan parton de Ĉeĥoslovakujo, kaj tie ricevis varman bonvenigon de la esperantistoj en Praha, Karlovy Vary kaj Brno. Alveninte en Varsovio mi trovis, ke plena programo de vizitoj kaj renkontiĝoj jam estis aranĝita de la Pola Akademio de Sciencoj (kun kiu mia universitato antaŭe starigis reciprokan gastigon). Tamen, dum la vesperoj mi havis la eblecon renkonti surlokaĵajn esperantistojn, kaj, efektive, mi faris esperantlingvajn prelegojn por pluraj kluboj pri la temo "Skotlando - Popolo kaj Pejzaĝo". Tiajn prelegojn mi faris en ok urboj. Ĉar la prelegoj kutime okazis en la Internaciaj Klubejoj de Libro kaj Presaĵoj la prelegoj atingis pli vastan publikon pere de traduko polen.

De tempo al tempo, kompreneble, oni petis min prelegi en profesiaj rondoj, sed tiaj prelegoj devis okazi en la angla lingvo. Tamen, mi sukcesis prezenti unu profesian prelegon en Esperanto, helpata de pola traduko. Tiu prelego — "Geografiaj Aspektoj de Interna Migrado en Britujo" — okazis en la kadro de komuna kunveno aranĝita de la Ekonomia kaj Geografia Societoj de Supera Silezio. Alia utiligo de Esperanto por profesiaj celoj rilatas al mia vizito al la universitato de Krakovo. Tie mi diskutis komunajn aferojn kun esperantista geografo, kiu scipovis nek la anglan nek la francan. Sen Esperanto ekzistus nerompebla lingva baro inter ni.

Forlasinte Pollandon meze de oktobro mi pasigis kelkajn tagojn en Vieno kaj Beograd, kie tre varme akceptis min la tieaj esperantistoj. Fine de oktobro mi atingis Bulgarujon, kie mi vere renkontis la plej densan reton de esperantistoj kiun mi ĝis nun trovis. Kaj eĉ universitataj rektoroj tie parolas Esperanton! Pere de la afabla helpo de la sindonemaj anoj de la Bulgara Esperanto-Asocio (inkluzive de du universitataj geografoj) mi faris mallongan rondvojaĝon tra la lando. Multfoje oni petis min alparoli grupojn — eĉ neesperantistajn. Dufoje mi salutis geknabojn en lernejoj, kie oni instruas la internacian lingvon, kaj kompreneble mi vizitis la redakcion

de tiu impona gazeto, "Nuntempa Bulgario".

Krom utilaj diskutoj kun samprofesiuloj mi faris ankaŭ du profesiajn prelegojn en Esperanto pri "Lastatempaj



ŝanĝoj en la Ekonomia Geografio de Skotlando" — unu al la Bulgara Geografia Societo en la Universitato de Sofio, kaj la alia al la studentoj kaj stabanoj de la Ekonomia Universitato en Sviŝtov. Tre riĉan rikolton da impresoj mi kunportis hejmen el Bulgarujo, kaj fakte sen Esperanto mi tute ne entreprenus vojaĝon al tiu lando, kie, feliĉe, mi eksciis, ke mi estas la unua postmilita vizitanto el la geografia fako de iu brita universitato.

De Sofio mi iris al Bukureŝto en Rumanujo, kie oni jam invitis min gastigi ĉe la Geografia Instituto de la Rumana Akademio. Ĉi tie mi ĉiam devis uzi la francan lingvon, kaj plenplenan programon oni aranĝis por mia dek-taga vizito. Tamen, unu vesperon mi trovis la Esperanto-klubon kaj oni tuj rompita la programon por aŭdi saluton de mi.

Post dua halto en Sofio mi komencis la vojaĝon hejmen, pasigante du tagojn en Niŝ en Serbujo. Ĉi tie ankaŭ la lokaj esperantistoj elkore bonvenigis min.

Kaj nun la ĉiutaga rutino plenigas mian tempon, sed mi certigas al vi ĉiuj, ĉu "gesinjoroj" aŭ "gekamaradoj", kiuj diversmaniere helpis min, ke mi neniam forgesos vian afablecon, kaj mi tutkore esperas denove renkonti vin dum la estonteco ie ajn en Esperantujo. Ĝis revido!

29-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj

okazinta inter 1-8. VIII en Varsovio

La prezidanto de kunveno Jan Silhan malfermis la Subkongreson. En la prezidantaron estis elektitaj: prezid. Silhan (Pollando), vicprez. Krehniak (Ĉeĥoslovakio), 2-a vicprez. Verlinde (Nederlando), sekr. Mucovski kaj Figuerola. Honora prezidanto de Kongreso estas M. Michalak, prezidanto de Pola Blindul-Asocio. La kongreson partoprenis 62 personoj el 15 landoj. Salutoj de kongreso flanke de D-ro A. Hulek, de Ministerio por Laboro kaj Sociaj Aferoj, prez. M. Michalak kaj prez. Luka (Ligo de Blindulkooperativoj) kaj de reprezentantoj de nacioj. Okaza parolado kaj omaĝo al la memoro de Zamenhof kaj himno.

Laborkunsido komenciĝis je la 9-a horo sub prezidanteco de s-ano Silhan, kaj posttagmeze Krehniak, kun jena tagordo: 1. Referato de la prez. Michalak pri la Blindulaferoj en Pollando, 2. Referato de D-ro Ewa Grodecka pri Tiftologia Centro de Pola Blindulasocio, 3. Vojaĝo tra

polaj blindulcentroj — parolado de E. Horacek el Vieno.

Tre viglaj debatoj montris vivan intereson vekitan inter kongresanoj, kiuj kun granda rekono parolis pri mirinda progreso de pola blindulafero en lasta dekvinjaro de Pola Popol-Respubliko. Nombro de partoprenantoj: 58 el 15 landoj.

Kunveno kun la tagordo:

1. Vizito de Centra Domo de Pola Blindul-Asocio en Varsovio: oficejoj, brajla presejo, biblioteko, eldonejo, tiftologia ventro, sidejo de Ligo de Polaj Blindulkooperativoj;
2. Laborkunsido kun referato de prez. Luka pri blindulkooperativoj en Pollando,
3. Regalo flanke de P.B.A. en Koncerta salono,

(Daŭrigo sur paĝo 177)

Belartaj Konkursoj 1958

Branĉo : Originala Prozo

Unua Premio

Vivo kaj de morto Wiederboren

Tiun infanon ni deziris dum jaroj. Kaj kiam liaj verd-oraj okuloj malfermiĝis al senvarma suno de februara mateno, ni pensis, ke li estas vere mirinda.

Ni ne plu estas junaj, kaj enpense ni akcelis la disvolvigon de lia vivo, kvazaŭ ni povus per nia deziro plirapidigi lian kreskadon; aliflanke, pro edukaj konsideroj, ni ne volis rigardi lin kiel miraklinfanon, kaj superestimi liajn unuajn sukcesojn. Sed mia patrino koro ekstazis kiam li, dujara, komencis malpurigi paperfoliojn per akvo-farboj (kun evidenta prefero por akvo); tamen, mia edzo, pli virece, diris: "Nu, ne kredu nun, ke vi naskis pentriston, kaj lavu al li la manojn".

La afero kun la farboj tamen marŝis. Nia etulo ne perdis entuziasmon, tagon post tago: male! "Pentiloj!", li pretendis ĉiumatene post kafo-lakto, kaj li restis kvieti almenaŭ dum tuta horo, ĝis li trotis al mi kun folioj en ruĝ-verd-flavaj manetoj:

"Vidu, panjo, kion mi pentis: tio estas fiŝo, tio veturilo, tio dometo....".

Kiam li fiere montris al mi bluan makulon kun ruĝaj apendicoj traŭrata de strioj el nedifinebla koloro, dirante, ke tio estas maljuna fiŝkaptisto, mi ne rezistis al la tento: mi enkadrigis la bildon kaj pendigis ĝin en nia salono. Efektive, inter moderna meblaro tiu gaja kolormakulo ne malindis. Ankaŭ mia edzo, post iom da grumblado pri molkoraj patrinoj, akceptis la fakton.

La bona Dio, aŭ la hazardo, kondukis al ni, tiun vesperon, mian amikinon Julian. Julia kaj ŝia edzo estis pretigantaj novan domon. Ŝi inspektis la nian kun kritika okulo.

"Novaĵo!", ŝi ekkriis.

"Kio?", mi diris.

"La bildo. Tiu bildo. Kie vi kaperis ĝin?"

Nu, Julia estas tre ekvilibra persono kaj admiringe justa patrino. Ŝi neniam estus enkadriginta..... Mi hontis.

"En Germanujo", mi rapide elĵetis, turnante al mia edzo peteman rigardon. Mia edzo sentis kompaton al mi, kaj helpe subtenis:

"Jes, dum nia lasta vojaĝo en Germanujo".

"Kaj kiu estas la pentristo?"

Mi faris, post neperceptebla hezito, parafrazon el la nomo de mia filo:

"..... Wiederboren."

"Ha, — diris Julia, kiu tre kompetentas, laŭ ŝi, pri arto moderna — mi konas."

Kompreneble ŝi konis Wiederboren. En tiu momento mem, li sidis sur ŝia dekstra genuo kaj gravmiene suĉis ĉokoladon.

Mia edzo komencis amuziĝi:

"Tiu bildo apartenas al nova germana skolo. Ĝi prezentas maljunan fiŝkaptiston. Ĉu vi vidas? Ĝi enhavas sensaciojn....; jes, sensaciojn....."

Ĉi-foje helpis mi:

"Tiu ĉi skolo, kiun Wiederboren ĵus iniciatis, celas doni ne nur superrealajn sentojn de la pentristo, sed la sentojn de la bildita objekto. Maljuna fiŝkaptisto sentas.... nu, la ruĝo estas eksterigo de lia venko-ĝojo en ĉiutaga lukto kun la blua elemento, kaj tiu ĉi brunaĵo.... nu.... indikas, ke li ne.... ne plu malsatas ĉar..... li manĝis la fiŝojn."

"Sed kiel vi aĉetis, kiom vi pagis....."

"Ho, nemulte.... Li ne estas ankoraŭ tre konata. Ĉu vi scias, li estis..... li estis eta kamparano. Foje li sidis ĉe strato-bordo kaj desegnis sur ŝtono per karbo-peceto..... Tiam hazarde pasis..... hm..... Pablo Picasso."

"Ha!", diris Julia, ravita, ne rekonante la malnovan historieton.

"Kaj Picasso kondukis lin al Parizo, kaj helpis lin", konkludis mia edzo. Sed mi jam rajdis sur leono:

"Komence li havis pezajn jarojn. Imagu: en frosta mansardo, sen mono, luktante por sia nova art-koncepto. Feliĉe dum tiu periodo inspiris lin florvendistino, lia nura morala helpo. Ili ankaŭ ĉikanis kelkfoje. Sed poste ŝi mortis. Ftizo", mi finis, dankante Murger enpense.

"Ho! — kortuŝiĝis Julia, — kaj nun?"

"Nun li komencas esti konata. Mi opinias, ke li havas grandan estonton antaŭ si. Mi pensas, ke aĉetante lian bildon ni faris eĉ bonan financon operacion. La valoro de liaj verkoj rapide kreskos" klarigis mi, klopodante forviŝi ĝuste unu el ili de sur mia jupo.

"Mi tre dezirus havi bildon lian por nia nova domo", intermetis la edzo de Julia, allogata de mia lasta frazo.

"Estas malfacile....."

"Kial?"

"Hm.... la limo..... ĉu vi scias..... eksportado de artaj varoj.... burokratio... permesoj..."

"Sed vi, kiel vi povis...."

"Ni kontrabandis."

"Ho, ĉu ne eblus ankaŭ por ni"

"Ni vidos."

"Klopodu, provu . . . skribu . . ."

"Ni vidos."

Julia foriris kun sia edzo. Ankaŭ sur ŝia jupo kuŝis ĉefverko de ĉokoladaj fingretoj.

Efektive, "ni vidis": kaj, je festotago de Julia, ŝi ricevis, en digna kadro, verkon kun klara subskribo: Wiederboren 1959. Nia fileto estis baptinta ĝin "ĉevalo *ganda* kun sinjoro *supe*", kaj al Julia ni klarigis, ke la griz-rozaj makuloj montras la miksitajn sentojn de ĉevalo al sia estro, kaj la multakva verdo estas enhavo de rajdant-animo.

Post kelkaj tagoj, Julia telefonis:

"Aŭskultu, kara, amiko mia deziras aĉeti verkon de Wiederboren. Ĉu eblus . . . vi farus al mi personan plezuron . . ."

Tiel komencis vendiĝi la bildoj de Wiederboren. Ni malfermis ŝpar-libreton por nia filo: jen, li trijara jam komencis perlabori sian estonton . . . Mia edzo malaprobis. Sed mi diris: "Kie estas trompo? Oni deziras tiajn bildojn: tiajn oni ricevas. Ĉar oni pagas? Nu, la mono apartenas al la aŭtoro: ni ne tuŝas eĉ centimon: kie estas la trompato?? Ĉu eble vi kredas, ke nuntempaj kolosoj de pentro-arto agas aliel?"

Post iom da tempo, ni ricevis la viziton de sinjoro Dominiko Drake, art-kritikisto.

"Ĉu mi povas fotografi viajn Wiederboren? Eh? Nur tiun ĉi vi havas? Ĉu ne aliajn?"

Jes, ni havis tutan stokon. Nia etulo ĉiumatene ŝtelis mian plej bonan leterpaperon, aŭ novan libron, aŭ ŝu-skatolon. Mi penis savi la murojn el freskoj de Wiederboren.

"Sed tiu germano estas vera talento!", diris Dominiko Drake — "ĉu vi ne donus al mi pliajn indikojn"

Ni rerakontis la Giotto'an historieton, la Murger'an romanon; ni eĉ aldonis detalojn el la vivoj de Van Gogh kaj de Modigliani. Ni klarigis la celojn de Wiederboren'a skolo.

Klera artikolo kun bildoj aperis en faka revuo. Ne mankis bildo pri Wiederboren: temis pri senkravata junulo dudekkvin-dudeksejara.

Tiu artikolo ne estis la nura. Demando pri verkoj de Wiederboren kreskis: ni luis salonon, kaj organizis ekspozicion. Ĉiuj bildoj vendiĝis. Ni komencis altigi la prezojn. Des pli kreskis la demando. Jam tagaj ĵurnaloj publikigis intervjuojn kun Wiederboren kaj fotojn pri li, el kiuj neniu similis al la alia: la aĝo variis inter dudek kaj kvardek, kaj li aspektis jen brunhara, jen blonda, prefere kun barbo, sed kelkfoje sen ĝi.

Kaj, laste sed ne plej malgrave, la ŝparlibreto de nia filo atingis rekordajn ciferojn. Ni estis devigataj administri kapitalon konsiderindan; la afero fariĝis riska. Kiamaniere trijara, kvarjara infano

povas fariĝi akciulo, nericevinte heredaĵon? Kiaj estas la fontogajnoj kiuj ebligas tion? Jes, procento sur la vendaĵoj de Wiederboren-bildoj . . . sed ĉu sufiĉas por klarigi

Iun matenon, mia edzo frontis min:

"Jen la tria letero de germana bild-vendisto kiu insiste demandas la adreson de Wiederboren. Kion ni faru nun?"

Krome, Wiederboren komencis ŝanĝi sian stilon. Anstataŭ larĝaj strioj kaj makuloj, anstataŭ necertaj koloroj, jen aperis marionetoj, arboj, domoj. "Kion ni faru nun?", rediris mia edzo senespere.

Tiel ni decidis mortigi Wiederboren. Ni ĵetis al la publiko la novaĵon. Li, ni diris, fine fama kaj rekonata, fariĝis riĉa kaj komencis diboĉan vivon. Virinoj ne mankis. Trompitaj edzoj eĉ ne. Unu el ĉi tiuj atakis lin kaj batis lin furioze. Li mortis sekve de tiuj batoj. (Verdire, mia edzo estus preferinta sinkopon: pli laŭmode, li opiniis. Sed mi elektis amvenĝon: pli romantike, mi diris).

Nekrologoj aperis en gazetoj kaj revuoj: oni rerakontis la mallongan vivon de Wiederboren, oni plendis, ke tiom alta genio ne povis doni aliajn ĉefverkojn, oni konjektis pri evoluo de lia arto, de lia skolo, se li estus pluvivinta. Tagĵurnalo publikigis eĉ kliŝon pri funebro. Alia, intervjuon kun la florvendistino de liaj fruaj jaroj: ŝajne, ŝi fariĝis intertempe itala grafino. Iom post iom, tamen, la morto de Wiederboren komencis malhavi intereson de ĵurnalistoj, kaj, kiam la "Tour de France" startis, ni pensis, ke ni fine liberiĝis el Wiederboren, el liaj bildoj, el la mono-pluvo kiu fariĝis embarasa

Nur unu aferon ni ne antaŭkalkulis.

Kun la morto de Wiederboren, la valoro de liaj verkoj dekobliĝis.

*S-ino Clelia Conterno Guglielminetti
Torino, Italujo*



Rigardo al la montaro survoje al Pollando.

4. Vizitado de Kooperativoj de brosfarado kaj de artaj teksaĵoj produktataj de blinduloj, kun dancvespero, al kiu partoprenis ĉirkau 100 personoj.
5. Akcepto de kongreso flanke de Pola Blindul-Asocio.

La kongresanoj estis forte impresitaj de granda agadvigleco de menciitaj organizaĵoj kaj iliaj imponaj atingajoj. La kongreso unuanime decidis esprimi al la Pola Registaro kaj al Pola Blindulasocio por modela prizorgado

Informoj por la junularo

"Afrikaj kaj Aziaj Problemoj"
Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Limburg/Lahn

Kiel en la pasintaj jaroj ni aranĝos infer Kristnasko kaj Novjaro nian tradician Seminarion, al kiu ni kore invitas niajn eksterlandajn geamikojn. Jen la unuaj informoj:

Honora Protektanto: S-ro Josef Schneider, Urbestro de Limburg/Lahn.

Loko: Junulargastejo en Limburg/Lahn, la urbo de la Esperanto-Eldonejo Limburger Vereinsdruckerei.

Tempo: De la 27-a de decembro 1959 ĝis la 2-a de januaro 1960; la malfermo okazos la 27-an de decembro vespere, la fermo la 2-an de januaro tagmeze.

Programo: Ĉefa temaro estos "Afrikaj kaj Aziaj Problemoj" pritraktataj per prelegoj kaj sonbendaj raportoj el Afriko kaj Azio; krome okazos Zamenhofa soleno, diskutoj pri la esperantista junularo, film- kaj lumbildprezentadoj, surbendigo de raporto pri la seminario, ekskursoj kaj silvestra balo.

Prezo: Pro ŝtata subvencio la prezo (enhavanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estos nur 40.— GM por gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj kaj 50.— GM por pli ol 25-jaraj. Parto de la vojaĝkostoj (ĝenerale 50%) sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo estos repagata al la gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj.

Aliĝo: Ĝis la 1-a de decembro 1959 al Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim, Germanujo, kun indikoj pri nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Por plifaciligi nian organizan laboron, bonvolu aliĝi kiel eble plej baldaŭ.

Koran bonvenon en Limburg/Lahn!
Germana Esperanto-Junularo
Federacia Estraro

5-a Internacia Junulara Skiferio kaj 3-a Internacia Junulara Skikonkurso de TEJO kaj Eŭropa Vintro-Universitato en FILZMOOS, Salzburg, Aŭstrio.

Ĉiujn-ĉi aranĝojn gvidas: Heinrich Reiter, Wien X., Sonnĉendg. 32-2-33.

La bonega sukceso de la lastjara TEJO-Skiferio en Filzmoos instigis nin elekti la saman lokon ankaŭ por la ĉiuntra skirenkonto nunjare unuafoje en kunligo kun la Eŭropa Vintro-Universitato.

de blinduloj en Pollando sian profundan rekonon.

Partoprenantoj 60 el 15 landoj. Ĉiuj kongresanoj partoprenis en la komuna impona kaj kortuŝa omaĝo al la genia kreinto de Esperanto. Ili trovis ankaŭ tempon por aŭskulti raportojn faritajn de prof. Krehniak el Brno (Ĉeĥoslovakio) kaj Karterud el Norvegujo, pri laboroj de Generala Sekcio de Mondkonsilantaro por bonfarto de Blinduloj okazinta en Romo, 21-30.VIII. 1959, kiu i.a. voĉdonis unuanime la rezolucion favoran al Esperanto kaj ties uzado kaj akcelado en blindulaj rondoj en la tuta mondo.

Esperantista Vivo

Naskiĝo: Ges-roj d-ro J. Kondor informas, ke ilia unua filineto Bernadette-Marion naskiĝis la 11-an de julio 1959.

Gefianĉiĝo dum la 44-a Universala Kongreso en Varsovio inter Božena Kapuŝcinska, Gdansk, kaj Kai Henriksen, Kopenhago. Baldaŭa geedziĝo en Pollando.

Geedziĝo: Hiltrud Gunkel kaj Hans Philipp Gunkel Germanujo geedziĝis la 24.7.1959.

NEKROLOGO

Bernard Long, nobla kaj honesta homo jam ne plu vivas. Grandan laboron li faris por sia lando, kie li ekz. funkciis kiel prezidanto por la 23-a U.K. en Krakovo, sed speciale por la junularo li multon faris. Bedaŭrinde s-ro Long ne povis partopreni la 44-an U.K., ĉar li mortis jam antaŭ ĝia okazo.

Francojo: La 23-an de junio 1959 mortis en Nice s-ro **Celestin RONCATI**, prezidanto de la Esperanto-Grupo de Nice, en la aĝo de 87 jaroj. Pioniro de nia movado kiu esperantiĝis en 1904 kaj estis delegito de U.E.A. en 1914.

D-ro Walter Heimann en Montevideo subite mortis la 1an de majo — 59 en sia 50 — vivojaro. Klera, fervora kaj agema membro de Urugvajja Esperanto-Societo li estis, kaj dank' al li la Esperanto-movado tiom kreskis en tiu lando. Li diplomiĝis pri medicino en Germanujo kaj Italujo.

Friedrich Pfaff

La 18-an de marto 1959 mortis en Worms meritplena esperantisto, rektoro emerita Friedrich Pfaff, estante 82 kaj duonan jarojn aĝa. Sian instruistan profesion li jam ekpraktikis kiel 19-jarulo en Worms, kie li seninterrompe restis ĝis la morto. Li estis ankaŭ specialisto pri instruado al blinduloj kaj surdmutuloj kaj rektoriĝis en 1931.

Foriris nobla homo el nia rondo, sed lia agado efikas trans la morton....

MIRINDA AKTIVULO MORTIS

Foliumante la Jarlibron de U.E.A. por 1959, vi trovos en la paĝoj 231 kaj 233 anoncojn el la urbo Tupaciguara, en Brazilo, kaj vi admiros la fervoron de la anoncinto, kiu finas sian reklamon per omaĝo al Zamenhof; sed vi ne povus diveni, ke tia varma aktivulo

Tempo: 26-a de Decembro 59-a vespere ĝis 5-a de Januaro 60-a tagmeze, do dek plenaj tagoj. Pli longa restado eblas je reduktita prezo.

Prezo: La kompleta prezo por tranokto, manĝo kaj partopreno al la diversaj aranĝoj estas por la indikita tempo: 480 aŭstr. ŝilingoj.

Antaŭpago: Aliĝo nur validas, se samtempe alvenas la antaŭpago de 180.— ŝil. al "Österreichisches Postsparkassenamt Konto Nr. 59.915, Heinrich Reiter, Salzburg" aŭ al mia supre indikita privata adreso. La antaŭpago estas garantio kaj ne povas esti repagata en kazo de nealveno de la aliĝinto. Aliĝojn ni nur povas akcepti ĝis plej malfrue la 1-an de Decembro.

Loko: Nia skirenkontejo estas la alpa gastejo-pensio "Reithof", 20 minutojn de la vilaĝo Filzmoos. Filzmoos estas atingebla aŭtobuse de la fervoja stacio EBEN IM PONGAU. Ĝi situas 1057 m super la marnivelo. Nia hejmo estas bele kaj agrable instalita kaj situas proks. 100 metrojn super la vilaĝa alto. Niaj gepartoprenantoj ne kuiras kaj laboras mem, sed estas prizorgataj de la nin gastiganta 14-kapa familio Ahornegger. Filzmoos situas piede de la Dachsteinmonto unuflanke, de Bischofsmützen-rokaro aliaflanke. Oni parolas pri la vilaĝo en la "salzburgaj dolomitoj" kun belega pejzaĝo. Multegaj skieblecoj por novkomencantoj kiel por progresintoj kaj skimajstroj, du skiliftoj kaj plej diversaj ekskurs- kaj promeneblecoj atendas Vin. Skioj kaj skiŝuoj estas lueblaj en la vilaĝo, sed prefere tamen kunportu Viajn proprajn aĵojn.

La Skikonkurson rajtas partopreni fraŭlinoj (aparte!) kaj sinjoroj de 16 ĝis 30 jaraĝaj, kondiĉe ke ili estas esperantistoj. Ni esperas, ke laŭeble ĉiuj junulaj Esperanto-grupoj de Eŭropo sendos reprezentanton!

Eŭropa Vintro-Universitato: Estas antaŭvidataj kvin prelegoj kun posta diskuto pri aktualaj demandoj de la eŭropa unuiĝo. La partopreno estas por partoprenantoj al la skiferio senkosta sed nedeviga.

Petante detalajn informojn skribu al mi, sed laŭeble ne forgesu, ĉemeti internacian respondkuponon. En la Eŭropo-Universitato ankaŭ ne-junuloj povos partopreni.

Represo petata.

Heinrich Reiter

estas kriplulo nur 60 centimetrojn alta, kies kolo, kruroj, brakoj estis molaj, senostaj. Li vivis en radseĝo al kies dorso estis ligita lia kapo pro la malfortikeco de la kolo.

En tiu tute kripla korpo tamen estis vigla, talenta homo, pri kiu oratoro tute prave diris okaze de lia entombigo:

"Lia korpo estis tute kripla; nur la kapo estis perfekta, sed li estis la konsolanto de la afliktitoj, la saĝa konsilanto kaj posedis neordinaran kulturon".

Tiu mirinda homo, naskita la 13-an de Marto 1932 kaj mortinta la 13-an de Julio 1959, estis la Delegito de U.E.A. en Tupaciguara (Brazilo), **Johano Custódio Machado**, gvidanto de junularaj organizaĵoj, fondinto kaj direktoro de "Librejo Esperanto", rimarkinda socia aganto. Lastatempe li vigle laboradis por konstrui en sia urbo gimnazion por malriĉaj nepagipovaj gejunuloj.

Plena de belaj homamaj ideoj li ne atentis sian propran kriplecon kaj ŝvebis tre alte kiel idealisto en la konstruado de la estonta mondo.

Lia patrino, S-ino Albertina Machado (sama adreso en la Jarlibro), estis por li gardanĝelo, kiu tage kaj nokte zorgis pri li kiel malgranda infano, kio li vere ĉiam restis laŭ la korpo. Por ŝi lia morto estas tre dolora frapo, kvankam ŝi havas 10 aliajn infanojn kaj 10 adoptitojn.

ANKAŬ POŝTMARKOJ HELPAS

Antaŭ kelkaj jaroj laŭ ideo de s-ro Sonnenfeld APO ricevis de multaj personoj donacon en uzitaj poŝtmarkoj. Tiam bedaŭrinde ni ne trovis personon, kiu povus kaj estus preta klasigi la poŝtmarkojn kaj transformi ilin en monon. Sendepende de tiu projekto pasintjare s-ro Peter Zacho komencis kolekti por UEA similajn donacojn. Li jam ricevis kaj konstante ricevas kontribuojn el diversaj landoj, klasigas ilin fake kaj diligente kaj transformas ilin en monon.

Car la sumo tiamaniere ricevita ne havis ankoraŭ difinitan destinon, laŭ interkonsento inter la ĝenerale sekretario de UEA, la ĉefo de APO kaj la kolektanto mem, ekde nun la tuta sumo gajnita pere de tiaj poŝtmarkkontribuoj estos destinita al APO por subteni tiel la pioniran laboron en foraj landoj.

Ni kore dankas al la ĝisnunaj sendintoj kaj esperas, ke ilia nombro baldaŭ pligrandiĝos. S-ro Zacho akceptas opajn valorajn poŝtmarkojn, samkiel tutajn kolektojn, kaj amasvaron.

Sendajojn bonvolu direkti al s-ro Peter Zacho, Randbølvej 4, Kopenhago F., Danlando. T. Sekelj

TRE URĜA TASKO

En nia movado dum la lastaj jaroj ni pli ol iam streĉis niajn fortojn por kolekti monon necesan al diversaj kampoj de nia propaganda laboro. Tia agado estas sendiskute subteninda. Ankoraŭ

la fondaĵo de Zamenhof funkcias. Kiam la Jubilea Jaro de Zamenhof estos finiginta ĉu do estus oportune streĉi niajn fortojn al mondkolektado por la agado en Azio kaj Afriko? Sendube jes! Ĉu ĉiuj de ni vere konscias kiel grava nia afero estas ĝuste nun en la neeŭropaj landoj, speciale en Azio kaj Afriko?

Fine mi volas memori vin pri la bezono de ekspozicia materialo por niaj hindaj gesamideanoj kio estas vere urĝa kaj necesa.

Adres: Esperanto-Societo de Bombay
7/A Balgovindas Road near
Shivaji Park Mahim
Bombay-16, Hidio B. Englund, Svedujo

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiutage	9.00-9.30	Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso. Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3 ^a -Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	15.30-16.00	Warszawa, 249m. (1205 kcs), 50.21m, 42.11m, 41.12m, 31.50m, 31.45m, 30.98m, 25.39m. P. Pola Radio, ul. Noakowskiego 24, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 49.42m, 39.11m. P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo varia dum unuhora diverslingva programo).
Lundo	00.45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	19.30-19.45	Vigo, 277m. (1082 kcs). K. La Voz de Vigo, Vigo, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50	Wien, 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30m., 26.10m., 20.20m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato). Radio I.B.R.A., Poŝtako 821, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	19.30-19.45	Vigo - Kiel lunde.
	22.50-23.00	Hilversum, 298m. (1007 kcs). I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 402m. (746 kcs). P. K.R.O., Emmastraat 52, Nederlando.

Radio Roma. 2-X, Mistikaj lokoj en Italujo; 6-X, Tra la literaturo; 9-X, Leterkesto kaj bibliografio; 13-X, Kristoforo Columbo; 16-X, Novajoj el Italujo; 20-X, Italaj kazonoj en Esperanto; 23-X, Mortinta urbo: Ostia Antikva; 27-X, Italujo kaj Lord Byron; 30-X, La kvina jarcento de la itala literaturo. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 1-X, Honore al la Tago de Mondpaco; 8-X, Pri la jugoslavia popola muziko; 15-X, Eta lando inter la mondoj; 22-X, Honore al la UNO-tago; 29-X, Novajoj el la movado kaj respondoj al korespondantoj.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio.

VERA MENĈIK

Vera Menĉik-Stevenson (1906-1944) akiris en internacia virina turniro en Londono 1927 la titolon de ŝaka mondĉampiono kaj defendis ĝin sesfoje kun sukceso. Ŝi partoprenis pli ol 60 internaciajn, naciajn, virinajn kaj klubajn turnirojn, precipe en Anglujo, kie ŝi vivis ek de jaro 1921.

Menĉik naskiĝis en Moskvo el miksa geedzeco. Ŝia patro estis Ĉeĥo, ŝia patrino Anglino. Ŝi estis ĉeĥoslovaka kaj post sia geedziĝo en jaro 1937 angla ŝtatanino. Ŝi pereis dum bombardado de Londono.

Antaŭ nelonge aperis rusa monografio pri Menĉik, verkita de mondĉampionino E. I. Bykova. La libro koncize kaj interese priskribas la vivon kaj ŝakkarieron de Menĉik kaj enhavas multnombrajn turnirtabelojn, foto-grafaĵojn kaj elekton de 93 ŝiaj partioj.

Ni alportas — kiel pruvon de la ludmaniero de Menĉik — ŝian malmultekonan tenkan partion kontraŭ Roháček el la turniro en Mnich. Hradiště 1933, kiu mankas en la menciita monografio.

Bl. : Menĉik, Ni. : Roháček

1. Ĉg1-f3, Ĉg8-f6, 2. c2-c4, e7-e6, 3. g2-g3 d7-d5, 4. Kf1-g2, c7-c6 (plej bona defendo, la aktiveco de Kg2 estas tre limigita), 5. 0-0, Ĉb8-d7, 6. d2-d3, Kf8-e7, 7. Ĉb1-c3, 0-0, 8. Dd1-c2, Tf8-e8, 9. b2-b3, b7-b6, 10. Kc1-b2, Kc8-b7, 11. Tal-d1, Dd8-c7, 12. d3-d4, Ta8-d8, 13. a2-a3, Dc7-b8, 14. Td1-d2, Db8-a8 (post evoluo komencas propra lukto. La pozicio de blanko estas pli movebla), 15. Ĉf3-e5, c6-c5, 16. Ĉe5xd7, Td8xd7, 17. c4xd5, Ĉf6xd5, 18. d4xc5, Ke7xc5, 19. Ĉc3xd5, Kb7xd5, 20. e2-e4! (per tiu ĉi defenda kaj samtempe ataka movo transiras blanko al atako) Kd5-c6, 21. Td2xd7, Kc6xd7, 22. b3-b4, Kc5-e7 (nigro troviĝas en plena defensivo), 23. Dc2-c3, e6-e5 (la peono fermas la diagonalon h1-a8, sed fariĝas objekto de atako. f7-f6 estis iom pli bona), 24. f2-f4, Kd7-c6, 25. f4xe5, Kc6xe4, 26. Dc3-c4! (Bonega movo! Pro minaco Kg2xe4 la punkto f7 ne estas defendebla) Ke4xg2, 27. Dc4xf7, Rg8-h8, 28. e5-e6, Te8-g8, 29. Tf1-f2, Db8-f8, 30. Rglxg2 nigro transpaŝis la tempon en malgajnita pozicio.

G. P.


Nova adreso de turnirgvidanto de EŜLI :

Jean Duthilleul, Chalet "Les Pommiers", Briançon-ville (Hautes Alpes), Francujo.

Problemo n-ro 7.

Dr. H. I. Musante.

(unua premio en konkurso de Práca 1957).



Mato en du movoj.

Kontrolo : Bl. : Rh1, Dh4, Ta8, Te5, Kd7, Kh8, Ĉc8, Cd2, p. a3, b6, (10).

Ni. : Rb5, De8, Td6, Kc6, Kd8, Ĉc5, Ĉe3, p. b3, d3, e4, e6, h5 (12).

Solvojn sendu ĝis 30.9.59 al gvidanto de la rubriko. Al problemo nro 6 : Ĝi havas kelkajn nekorektaĵojn, bv. pardonu tion.

KRUCVORTENIGMO

SOLVO DE LA PROBLEMO No 1

HORIZONTALE : 1. Magdalenĵi - 2. Akrigilon - 3. Scenarist - 4. Ken - Nokto - 5. Ole - San - 6. Bird - Sild - 7. Ale - Karga - 8. Loti - Foin - 9. Ono - Kojot.

VERTIKALE : 1. Maskobalo - 2. Akcelilon - 3. Grene-ro - 4. Din - 5. Agant - 6. Liro - Ŝafo - 7. Eliksiroj - 8. Nostalgio - 9. Intendant.

PROBLEMO No 2

— Ĉiuj radikoj estas troveblaj en la lasta eldono de la Plena Vortaro.

— R = radikoj sola, sen finaĵoj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	Ĉ	A	R	L	A	T	A	N	O
2	I	D	E	O	L	O	G	I	A
3	E	M	E	R	I	T	O	S	
4		L		D	I	A	R	G	O
5	U	R	O		C	L	A		
6	L	A		S	O	L	I	F	I
7	I	L	I		S	O	F	O	
8	N	E		T	A	M	B	U	R
9	O	J		E	G	O	I	S	T

HORIZONTALE : 1. Foira apotekisto - 2. Ideara - 3. Penŝilo - 4. Rilatas al la subjekto de prepozicio - Malkonstipo - 5. Sovaga bovo - Premglatigi vestojn(R) - 6. Neuzenda antaŭ propraj nomoj - Deziris fluaĵon - 7. Nek via nek nia - Larĝa apogseĝo - 8. Esprimas mal-konsenton - Muzikilo (R) - 9. Esprimas bedaŭron - Memamanto (R).

VERTIKALE : 1. Publikulino - 2. Oficejo de ŝiparestro (R) - 3. Denove - 4. Insula honora titolo (R) - Sufiĉe - 5. Ŝanĝo - Faro (R) - 6. En tia politika sistemo la civitanoj ne havas multajn rajtojn - 7. Ĝi donas kapturigojn sur malplenaj spacoj (R) - 8. Pronomo - Inspirus piajn sen-tojn. - 9. Izola ripozejo - Destino (R).

La poŝtmarkkolektado. Statistikoj la unuan de septembro : 2500 steloj. Konfirman dankleteron por la unua sendaĵo ricevas ĉiu, kiu klare kaj preslitere skribas sian adreson. Sendu daŭre al

P. Zacho, Randbølvej 4,
Kopenhago F.

**VARBU REKLAMOJN
POR JARLIBRO 1960 !**

Partoprenu nian konkurson !

(Vidu dorsan flankon de la sept. no. de tiu ĉi revuo)

Grava Peto!

La esperantistoj en Sovetio ne havas Esperantajn lernolibrojn aŭ vortarojn. La ĝisnuna lernolibro de s-ro N. D. Andrejev (eldonkvanto estis 95.000 ekz.) estas jam elĉerpita. Por sovetaĵ esperantistoj treege mankas Esperantaĵoj! Ili instruas kaj lernas nur buŝe, kio estas malfacila kaj malsufiĉe. La instruistoj ne havas materialojn por instrui. Ili ne povas mendi ion per interŝanĝo de libroj, ĉar sur ĉiu libro sendata okcidenten ili devas skribi la dedikacion sur la titola paĝo kaj la poŝto provizas tiun paĝon per la stampilo: "Cadeau vente réservée" aŭ "Gift not for sale". Tiel stampitaj libroj perdas la komercan valoron. Krom tio la respondkuponoj estas haveblaj nur en tiuj kazoj, se estas pruvite, ke petanto bezonas mendi el eksterlando la baptateston aŭ aliajn dokumentojn necesajn por pasportoj aŭ "kartoj de la identeco". Unuvorte la esperantistoj ne povas provizi sin per lernolibroj Esperantlingvaj aŭ vortaroj. Tial ĉiuj alsendaĵoj en Esperanto estas treege dezirataj de sovetaĵ esperantistoj.

Precipe estas dezirataj:

La Esperanto kurso de Andreo Cseh,
La konversaciaj amuzaĵoj,
La konversacia literaturo,
La revuo "Praktiko"

Ĉiuj aliaj Esperantaĵoj aŭ ĝiaj restaĵoj.

Bonvolu konsideri, karaj geesperantistoj tiujn malfacilaĵojn de viaj gefratoj kaj helpadi komplete per alsendado de malnovaj jam tralegitaj Esperanto gazetoj aŭ restaĵoj de iu ajn Esperanto eldonoj.

Mi citas la adresojn de la plej bezonantaj gvidantoj de Esperantaj kursoj:

1. A. P. Drosdov, *Astronomičeskij per. 18, Taškent 52, Uzbekistano, U.S.S.R.* (Li estas la gvidanto de esperanto-kursoj laŭ rekta parolmetodo).

Aleksej I. Veršin, *Poŝtkesto 256, Odessa, U.S.S.R.*

P. M. Kirjuŝin, *ul. Krasnaja 16, kv. 20, Minsk 5, U.S.S.R.*

Aleksandro Kurnosov, *Poŝtkesto 16, Saratov, U.S.S.R.*

S. N. Podkaminer, *Petropavlovskaja 4, kv. 34, Leningrad, U.S.S.R.*

Tiu modesta listigo ne elĉerpas ĉiujn. Estas eble citi pli multajn.

Pro alsendado de ia ajn Esperantaĵo — koregan dankon!!

DELEGITOJ

Francujo

Longué (Maine-&-Loire) FD (vojoj): vakas.

Germanujo

Braunschweig (Niedersachsen)

D: vakas.

FD (fervojoj): vakas.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 319

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aŭgusto kaj ankaŭ por komparo je la fino de aŭgusto 1958:

	1958	1959
Asociaj membroj	12949	16009
Individuaj membroj		
MJ	733	823
MA	4773	5187
MS	524	509
Pat.	5	7
DM	306	338
HM	46	45
JMJ	15	28
JMA	94	172
	6496	7109
	19445	23118

Israelo

Nahariya (Galil) VD: vakas.

FD (librobindado): vakas.

Nederlando

Woudrichem (Noord-Brabant)

FD (pac-edukado): vakas.

Norvegujo

Korgen (Nord-Norge) D: vakas.

FD (komerco): vakas.

Brazilo

Guajará (Rondônia) FD (spiritismo):

S-ro Roskildes Pereira de Mélo, ŝtat-oficisto, Av. 12 de Outubro 223.

Rio de Janeiro (Distrito Federal) FD (ŝparkaso): S-ro Walter José Nogueira, ŝparkasoficisto, Rua Miguel Cervantes 57 casa 1.

Islando

Reykjavík D: S-ro Arni Bövarsson, filologo, Managötu 23.

FD (turismo): S-ro Baldvin B. Skaffell, urba oficisto, Barmahlíð 21.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

503 Souza, S-ro João Batista de Melo,

Rio de Janeiro, Brazilo.

504 Sparks, S-ro Robert, Zanzibar.

DUMVIVAJ MEMBROJ

Hawkins, S-ro S. R., Plymouth, Britujo.

Hoché, S-ro Hilary, pow. Limanowa, Pollando.

Lyman, S-ro Van Allen, San Diego, Usono.

DONACO AL GENERALA KASO

S-ro J. Verdier, Belgujo 4.45 gld.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

474 Rossetti, S-ro R., Bristol, Britujo.

475 Weile, S-ro Knud, Høng, Danlando.

476 Whitworth, S-ro Albert, Thorold, Kanado.

La 1-an de septembro 1959

477 Piétri, S-ro Lucien, Meknes, Maroko.

478 Denniston, S-ino G., Alexandra, Nov-Zelando.

479 Sakowicz, S-ro R., Nowa Sol, Pollando.

480 Carrfors, S-ino Solwieg, Bromma, Svedujo.

481 Gerdman, S-ro Birger, Stockholm, Svedujo.

482 Turner, S-ro Fred, Linköping, Svedujo.

483 Brink, S-ro D. M., Los Angeles, Usono.

484 Lieberman, D-ro E. James, Staten Island, Usono.

FONDAĴO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 16060.77 gld.

C. J. Milkuschutz 2.60 gld., Argentino; C. R. A. Declerck 4.— gld., Belgujo; Ismael Gomes Braga 10.— gld., Brazilo; J. ter Schegget 1.— gld., S-ino N. Moormans-Vermaas 5.— gld., Nederlando; R. Harding 2.61 gld., Wanganui Esp. Grupo 10.60 gld., Ges. Potts 106.— gld., Nov-Zelando; C. J. Timmerman 7.50 gld., Sud-Afriko; Sveda Somera Semajno Frostavallen 489.51 gld., Svedujo. Noble Holderread 22.62 gld., A. E. Regal 11.31 gld., F-ino J. L. Regal 7.54 gld., Usono, Robert Sparks 17.24 gld., Zanzibar.

Entute 16758.30 gld., je 1.9.1959.

Al ĉiuj donacintoj tre koregan dankon!
M. H. Vermaas, Direktoro C.O.

ANONCETOJ

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, LONDON W. 9, Britujo. Telefono CUNningham 4487.

Ibra Radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20.15 horo mezeŭropa tempo. Ondlongoj 32.5 m, 26.1 m kaj 20.2 m. Ibra sendas en multaj lingvoj. Aŭskultu kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1. Svedujo.

Ĉu troviĝas inter la lertaj Esp-istoj anglalingvanoj kiuj scipovas la "Kristan Sciencon" kaj eble interesiĝas pri eldonado de Esp. traduko de ĝia instru-libro? Jam ekzistas unu traduko aprobita de plej eminentaj Esp-istoj. Interesatoj bonvolu kontakti: John F. Clewe, 1234 West 40th Place, Los Angeles 37, California, U.S.A.

Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo. Fondaĵo staras je 7 pundoj.

Urugvajo. D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos, serĉas la preĝon "Patro Nia" en plej div. lingvoj, dialektoj kaj variantoj. Rekomencos laŭdezire. Anonco ĉiam valida.

La Haga Katolika Esperanto-Unuiĝo "Mara Stelo" organizos letervesperon je la 29-a de oktobro. Skribu grandnombre al la ĉi-suba adreso. Ni nepre respondos. Adreso: F. Oliemans, Bazarstraat 37, Den Haag, Nederlando.

La temkolektantoj. Mi estas 24-jara filatelisto kaj kolektas neuzitajn florpoŝtmarkojn. Pro tio mi serĉas interŝangamigojn el ĉiuj landoj. S-ro Harri Melasniemi, Kappalaisentie 18, Turku 9.

Finna 20-jara fraŭlo volas korespondi kun gesamideanoj de malproksimaj landoj. Seppo Sandell, Karjalantie 30, Hyvinkää.

Interstene deziras korespondi: P. Giacinto Jacobitti, P.S. Maria Maggiore 8, Roma, Italujo.

Kiu volus interŝanĝi, diversajn esp. glumarkojn (speciale mi interesiĝas pri tiuj el U.K.), esp. librojn kaj revuojn.

Mi rekomencos laŭeble post interkonsento. Mi ankaŭ deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj ne-ŭropaj, escepte de Britujo, Danlando kaj Nederlando. Skribu al Vlad. Váňa, Křížkory sady 1, Plzeň, Ĉeĥoslovakio.

Croydon, Anglujo: "Young Esperantists Club" — klubo por gejunuloj 14-18 jaraj, havas mikrobuson kaj esperas kiel eble plej ofte viziti alilandajn grupojn. Ni deziras havigi gekorespondantojn por niaj gekomencantoj, tiel ke ili povu ne nur skribi al la fremduloj, sed ankaŭ renkonti ilin, do la korespondantoj loĝu, ekzemple, ne pli ol 400 km. for de Anglujo. Pardonu la peton, sed la junuloj povu legi vian skribajon, do bonvolu aŭ tajpi aŭ skribi preslitere, kun spacoj inter la vicoj kie ni povos meti la tradukon: al aliaj komencantoj ni respondos same. Longegaj leteroj estus netaŭgaj. Skribu unue al la klubestro, S-ro L. G. Hartridge, 64, Larier Road, Addiscombe, Croydon, Surrey, kiu certigas al vi respondon (Croydon estas 15 km. de Londono). Dankon.

Sendu al mi ilustritan poŝtkarton de via lando, mi faros certe la samon. Italo Peccioli, Rua Mal. Bittencourt, 500 Jau, Sao Paulo, Brazilo.

Por granda ekspozicio Johanesburga Esperanto-Societo volas ricevi portretojn de unuopaj gesamideanoj laŭ for-

mato minimume 10 × 15 cm. Aldonu informon pri vi mem, pri via laboro kaj skribu maksimume 60 vortojn pri la temo: "Kial mi lernas kaj ŝatas Esperanton". Propagandaŭgajn verkaĵojn oni premios. Oni ankaŭ deziras bildkartojn, gazetojn, afiŝojn, turismajn broŝurojn, nacilingvajn Esperanto-lerolibrojn, kaj vortarojn. Sendu antaŭ 31 oktobro al E. W. Woodruff, Esperanto-ekspozicio, P.O. Box 3293, Johannesburg, ŝ udfafriko.

21-jara studento deziras interŝanĝon per bildkartoj kaj jaz-notoj kun la tuta mondo. Bv. skribi al Vladimir Romanov, Leningrad K-37 Ozerki, Poste Restante, USSR.

Letervespero okazos 2 decembro. Skribu al Kopenhago Esperantista Klubo, Lovetandsvej 31, Kopenhago-Brh. Danlando. Komencantoj aŭ spertuloj respondos laŭbezone.

Esperantista Societo "La Verda Stelo" Zrenjanin, Jugoslavio, al siaj leteraj kontaktgekamaradoj sendas salutojn en la Zamenhofa Jaro.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj Dieter Kremp, Kastellstrasse 17, (17a) Karlsruhe-Durlach, Germanujo.

Deziras interŝanĝi bildkartojn, Esperantajn aŭ naciajn. Nepre respondos ĉiun sendinton per ilus. P.K. Sendu al Esperanto Kurso, Evening College, Manly, N.S.W., Aŭstralio.

Kiu sendos al mi almenaŭ unufoje belan bildkarton filatelie afrankitan? Mi sammaniere respondos. S-ino M. F. v. Dongen, Postbus 268, 's Hertogenbosch, Nederlando.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝtformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:
7. Av. Léon-Gourdaul
Choisy-le Roi (Seine) Francujo.

Administracio:
5. Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

Novaj membroj! Konatiĝu kun

BELARTO

antaŭ ol ĝi estos elĉerpita!

LITERATURO
PENTRARTO

MUZIKO
LINGVISTIKO

Prezo: 2,75 gld. (11 steloj) por membroj

3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj

72 p.

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto

de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo: 11.— gld. bindita

44.— steloj

9.— gld. broŝurita

36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

STAFETO

kunhelpas la solenon de la

Zamenhofa-Jaro

per pli ol 2.000 paĝoj, jene :

- 1 **Julio Baghy : Songe sub pomarbo**
Originala triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj. 232 paĝoj. Prezo : 1.80 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.
- 2 **Esperanta Antologio : Poemoj 1887 - 1957**
Redaktis William Auld. 648 paĝoj. Prezo: broŝ. 3.60; tolbind. 4.20 us. dol. aŭ egalv.
- 3 **Marjorie Boulton : Eroj**
Originala poemaro. 368 paĝoj. Prezo : 2.40 us. dol. aŭ egalv.
- 4 **Gaston Waringhien : Lingvo kaj Vivo**
452 paĝoj. Prezo : broŝ. 3.40; tolbind. 4.00 us. dol. aŭ egalv.
- 5 **Tibor Sekelj : Nepalo malfermas la pordon**
Originala geografia libro. ĉ. 300 paĝoj, riĉe ilustritaj, eĉ kun koloraj bildoj.
Prezo : 3.00 dol.
- 6 **Leander Tell : La bela subtera mondo. Libro pri grotoj**
Originala enkonduko al la speleologio. ĉ. 150 paĝoj, el kiuj triono estas bildaj.
Prezo : 2.00 dol.

Aliaj titoloj baldaŭ sekvos !

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON !